

# UKRAINA STELO

GAZETO de UKRAINAJ ESPERANTISTOJ

n-ro 3-4 2017

nia agado

## DENOVE NIN INVITAS KOLOMEO



paĝo 3




paĝo 31

## Osip Makovej – 150

jubileoj

125 JAROJ EKDE  
LA NASKIĜTAGO  
DE MIĤAJLO  
HAJVORONSKIJ



paĝo 47

# UKRAINA STELO

gazeto de ukrainaj esperantistoj  
fondita de Oresto Kuzma en 1913  
Aperas kvaronjare. N-ro 3-4, 2017

## ENHAVO

### ANSTATAŬ LA PAĜO DE LA REDAKTORO

Denove nin invitas Kolomeo ..... 3

## NIA HISTORIO

E. Privat.

La vekigo de granda nacio ..... 6

## 2017 – LA JARO DE L. ZAMENHOF

Proponitaj prelegoj

por la kolokvo en la kadro de OKT-2017

A. Emmerich. Kongresaj paroladoj

de L. L. Zamenhof kiel manifesto

de esperantismo ..... 11

N. Daniljuk. Artaj kvalitoj de la originala

E-poezio de Ludoviko Zamenhof ..... 16

A. Künzli. Zamenhof, Ĝenevo 1906,

kaj Ruslando 2014 ..... 22

H. Becklin. La novjunulo kaj Esperanto ... 26

V. Pajuk. Vasil Misik, la unua ukraina

tradukisto de la Esperanto-literaturo ..... 29

## JUBILEOJ

Osip Makovej – 150 ..... 33

M. Zastavnij. 125 jaroj ekde la naskiĝtago

de Miĥajlo Hajvoronskij ..... 50

## ESPERANTO – MALESPERANTE

Lazaro Ludoviko Zamenhof. La vojo ..... 51

## HISTORIO DE LA E-MOVADO

### EN UKRAINIO

V. Jaskovec. Ankoraŭ kelkvorte

pri la filokartio ..... 53

Redaktoro: Volodimir Pacjurko

Arta redaktoro: Niko Voloŝin

La poŝta adreso de la redakcio:

„Ukraina Stelo“, p.k. 26,

Lucko-18, UA-43018, Ukrainio

La retadreso:

ukrainastelo@gmail.com

Ĉion por „Ukraina Stelo“ sendu

laŭ ĝia retadreso.

La papera versio de la gazeto

mendblas ĉe Niko Voloŝin

laŭ la retadreso:

niko\_helianto@yahoo.com

Ni ne pagas honorariojn.

Pri la enhavo de la kontribuoj

responsas la aŭtoroj mem.

La redakcio ne ĉiam dividas

la opiniojn de la aŭtoroj.

Ĝi lasas al si la rajton mallongigi

materialojn.

Monoferoj por malgrandigi la

prezon de la papera gazetversio

aŭ fari ĝin nula por ne pagipovaj

personoj bonvenas:

Приватбанк, картка

4149 6258 1328 2819,

Волошин Микола

Володимирович



## DENOVE NIN INVITAS KOLOMEO

aŭ De la jaro de „Ukraina Stelo“ ĝis la jaro de Zamenhof

Ŝajnas, ke tute antaŭ ne longe ni celebris la centjariĝon de nia esperanta gazeto. La scienc-praktika konferenco en Kolomeo, dediĉita al la jubileo de „Ukraina Stelo“, elvokis viglan intereson al Esperanto ne nur inter ĝiaj adeptoj, sed ankaŭ inter la homoj, kiuj havis nenian rilaton al la internacia lingvo. La 12-an de oktobro 2013 en la korto de la domo, situanta en malgranda strato proksime de la urbocentro, kolektiĝis ĉirkaŭ cent homoj okaze de inaŭguro de la memoriga tabulo omaĝe al la redaktoro de la gazeto, pioniro de E-movado en Okcidenta Galicio Oresto Kuzma. La tabulo estis lokita sur la muro de la domo, kie li loĝis kaj kiu servis ankaŭ kiel redakciejo. Du restaŭritaj ĉambroj, kiujn la nova domposedanto Vasil Antonjuk dediĉis al la estonta muzeo de Kuzma, malfermis tiutage siajn pordojn por vizitantoj.

Pri la okazintaĵo multe informis la amaskomunikiloj. La plimulto de la esperantistoj, partoprenintaj la solenaĵojn (ili nombris ĉirkaŭ kvindek), neniam antaŭe estis en Kolomeo, sed ili malkovris por si unikan ĉarmon kaj aŭron de ĉi malnova urbo. Ja Kolomeo estis kaj restas grava centro de la ukrainaj historio kaj kulturo, kaj tiusence rivalas kun pli grandaj urboj aŭ eĉ superas ilin.

Ĝojiga estas la fakto, ke la esprimita en la konferenco propono de Vasil Antonjuk okazigi ĉiujare la Tagojn de Oresta Kuzma, enradikiĝis. Ĉi jare la aranĝo okazas la kvaran fojon. Ĝi pasos sub la ĝenerala temo, dediĉita al la Jaro de Zamenhof, – „La

## anstataŭ la paĝo de la redaktoro

mondrigardo de Ludoviko Lazaro Zamenhof en la kunteksto de la tuthomaraj valoroj“.

La slogano de la kolomeaj E-aranĝoj estas „Per Esperanto labori por bono de Ukrainio“. Estas agrable, ke ĝi ne restis nura slogano, sed per persista, ofte poguta laboro donas bonajn rezultojn. En la pasintaj kvar jaroj estis preparitaj pli ol 20 artikoloj, parto de kiuj havis ne nur sciencan signifon, sed estis iugrade sensaciaj. Estiĝis kunlaboro kun la lokaj muzeoj. Pri la materialoj de la sciencpraktika konferenco „Ivan Franko kaj Miĥajlo Hruŝevskij – du titanoj de la ukraina kulturo“, okazinta en kadre de OKT-2016, ekinteresiĝis la Instituto de Ivan Franko de la Ukraina Sciencakademio. Partopreni la aranĝojn, okazintajn en Kolomeo, Jablunivo, Krivorivno estis invititaj loka loĝantaro, reprezentantoj de la aŭtoritatoj, amaskomunikiloj, socipolitikaj agantoj.

Dum la grupo de aktivuloj estis preparanta tiun aŭ alian renkontiĝon science kaj organize (temo, programo, tagordo, invitiloj, libro kun materialoj ktp.), la gemastroj de la domo-muzeo de O. Kuzma Vasil kaj Luba kun lokaj simpatiantoj de Esperanto laboris en „malfronto“: zorgis pri la enhoteligo, buso, ekskursoj, piknikoj kaj aliaj pragmataj aferoj. Nepre notindas, ke s-ro Vasil malavare sponsoris niajn renkontiĝojn.

Do, kiel en la antaŭaj jaroj, Kolomeo kaj la domo-muzeo de Oresto Kuzma, denove invitas siajn malnovajn kaj novajn geamikojn partopreni la Tagojn de Oresto Kuzma-2017 (24-27.08.17). La ĉi jara programo planiĝas tre riĉa. Estos, kiel ĉiam, interesaj prelegoj kaj diskutoj, dutaga ekskurso al pitoreskaj Dnistro, Zaliŝĉiko, al la ĉefurbo de Norda Bukovino Ĉernivco.

Bonvenon kaj sukcesan laboron!

## MININTERVJUO

**La redakcio de „Ukraina Stelo“ petis kelkajn personojn, kiuj partoprenis ĉiujn kvar antaŭajn renkontiĝojn en Kolomeo, respondi unu demandon: „Per kio vin allogas kolomeaj E-renkontiĝoj“. Jen kion ili respondis:**

**Viktor Jaskovec** (Ivano-Frankivsko): Jam por la unua OKT, okazinta en la jaro 2014, s-ro Volodimir Pacjurko petis min prepari prelegon pri esperantistoj-siĉpafistoj. De tiam mi ekinteresiĝis pri la historio de la ukraina E-movado kaj ĉiujare preparas novajn prelegojn, bazitajn sur la propraj esploroj. Nuntempe ne multaj memoras la nomojn de ukrainaj esperantistoj Jaroslav Fedorĉuk, Ivan Ĉepiha, Lev Ŝĉirba, Jurij Soltykevyĉ, Tadeo Skotynski k. a. La aranĝoj OKT, krom renkontiĝoj kun la amikaro, plezuraj interparoloj, allogaj ekskursoj permesas remalkovri forgesitajn E-paĝojn de la ukraina historio. Kaj tiudirekta esplorkonferenco, kiun mi komencis en kadre de OKT, jam fariĝis ereto de mia vivo.

**Petro Palivoda** (Kijiva provinco): Unuafoje mi trafis Kolomeon preskaŭ kontraŭ mia volo. Viktor Pajuk el Usono informis min pri esperantista konferenco kaj invitis min tien. Kaj kiam mi, ĉiam ne tro vojaĝema, komencis rifuzi, hontigis min, ke, jen, li venos el Ameriko, kaj mi ne volas veni el Kijivo. Mi alveturis kaj konsciis, ke al mi estas tre komforte kaj interese tie. En Kolomeo loĝas gastamaj gemastroj s-ro Vasil kaj s-ino Ljuba. Tien venas multaj neordinaraj homoj, multaj el ili iĝis miaj amikoj. Krom Kolomeo, dum tiuj jaroj mi vizitis la unuan fojon tiajn allogaĵojn, kiel Pisanij Kamin, Rosoĥata, Bukovel, Jaremĉe, Kosiv, Jabluniv... Kaj kiam mi ankoraŭ tradukis en Esperanton kanton pri Kolomeo, do certe komprenis, ke mi pareniĝis kun la urbo por ĉiam.

**Vasil kaj Irina Voroblevskij** (Lvivo): Dum kolomeaj aranĝoj ni ĉiam ekscias ion novan el la historio de la E-movado en Ukrainio, pri ĝiaj elstaraj reprezentantoj, pri Esperanto ĝenerale. La programoj de la renkontiĝoj estas tre variaj kaj riĉaj, en ili optimale kuniĝas la sciencaj kaj distraj programeroj. En la muzeo de Oresto Kuzma ni havis eblecon vidi unikajn eksponaĵojn: la Unuan libron, komunan foton de la partoprenintoj de la Unua kongreso de Esperanto, la fotoaparaton de Kuzma kaj multajn aliajn. Ni povis praktiki nian kapablon paroli Esperante, ja hejme ni faras tion tre malofte. Estas agrable renkonti malnovajn geamikojn, konatiĝi kun la novaj partoprenantoj. En la ekskursoj ni re- kaj remalkovras por ni novajn detalojn el la geografio kaj historio de nia lando.

## VIN INVITAS AL SI KOLOMEO

Teksto de Volodimir Dankeviĉ,  
muziko de Dmitro Cihankov

Primavere bonvenu al ni,  
Kiam floras ĉe ni kastaneoj,  
Kiam sonas ĉe Prut' melodi',  
Vin invitas al si Kolomeo!

### *Refreno*

Eĉ en foraj ravaj mondoj  
En memoro bluos montoj,  
Kor' sopiros al paseo,  
Kolomeo, Kolomeo!

Eble loĝas feliĉ' tie ĉi,  
Logas vin ĉarmulin' en fabelon,  
Kiam fluas vesper' en juli',  
Kovras alpa arom' Kolomeon.

### *Refreno*

En aŭtuno bonvenu al ni.  
Partoprenu kun ĝoj' gajan balon,  
Dancu fajre en arda pasi',  
Kiam ludos kun ŝalmoj timbalo.

### *Refreno*

Se timigos vin vintra vizi',  
Kiam frostoj brakumas piceon  
Kaj surmontas nur neĝ' kaj glaci',  
Vin varmigis per kor' Kolomeo.

### *Refreno*

*Elukrainigis Petro Palivoda*



Eminenta svisa esperantisto **Edmond Privat** (1889-1962) unuafoje konatiĝis kun ukraina literaturo kaj trovis klarigojn pri ukrainaj naciaj aspiroj dank' al la gazeto "Ukraina Stelo" ankoraŭ antaŭ la Unua mondmilito, t.e. estinte 24-25 jaraĝa. Li mem konfesis tion en la letero skribita en Ĝenevo 10.06.1918<sup>1</sup>. Tiutempe la ukraina lando estis dividita inter Ruslando (la pli granda parto) kaj Aŭstrio-Hungario (Ga-

(kaj Lublina provinco) – Lvivo. Sub la impreso de la vidita, E. Privat en siaj artikoloj komencis protekti la principojn de nacia suvereneco. Unuavice li apogas sendependiĝon de Pollando, sed ankaŭ streboj de aliaj nerusaj popoloj ne lasis lin indifera, kvankam tio ne estis facile, ĉar li devis manovri inter la politikoj de la ŝtatoj de Entento (Unuiĝinta Reĝlando, Francio kaj Ruslando) kaj la Mezaj Ŝtatoj (Germanio kaj Aŭstrio-Hungario).

Marte 1916 en Laŭzano (Svisio) estis fondita "Ligo de aligentaj popoloj de Ruslando"<sup>2</sup>, kiun eniris reprezentantoj de nerusaj nacioj: la ukraina, pola, belorusa, kartvela, finna, aliaj baltaj kaj muzulmanaj popoloj de la cara Ruslando. La 9-an de majo 1916 en Stokholmo la Ligo akceptis memorandum, kiun sendis al la usona prezidento Woodrow Wilson. En la tuta mondo oni atentis pri la problemo de apartaj nerusaj nacioj de Ruslando.

29.06.1916 en la ĝeneva bulteno "La Guerre mondiale" Edmond Privat publikigis la artikolon "La politika flanko de la rusa ofensivo"<sup>3</sup>, en kiu priskribis la rusan agreson en Galicio. Por prezenti la politikon de la agresanto,



licio, Bukovino, Transkarpatio, Lemkio), kiuj en la jaroj de la Unua mondmilito estis la malamlikoj.

Dum la mondmilito Edmond Privat, kiel civitano de la neutrala Svisio, ricevis la redakcian taskon de la franca "Le Temps" travojaĝi la orientan ĉeffrontan teritorion. Aprile-maje 1915 li vizitis Pollandon kaj Galicion laŭ itinero Varsovio – Lublino

<sup>1</sup> "Ukraina Stelo" n-ro 1(18), 1922, p. 2-4.

<sup>2</sup> france "Ligue des peuples allogènes de Russie", germane "Die Liga der Fremdvölker Russlands", ruse "Лига международных народов России".

<sup>3</sup> Edmond Privat, "Le côté politique de l'offensive russe" // "La Guerre mondiale" № 564, 29.06.0916, pp. 4505-4506 (vd. <http://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k2460472/fl.item>).

li citis vortojn de la rusa grafo Bobrinskij (la provizora guberniestro en Galicio kaj Bukovino), diritajn la 10-an de septembro 1914 en Lvivo: “La orienta Galicio kaj Lemkio ĉiam estis neapartigebla parto de Granda Ruslando. Ĉi tie, sur ĉi tiuj teritorioj, la indiĝena loĝantaro ĉiam estis rusa; tial la nova reĝimo devas baziĝi sur la rusaj elementoj. Mi enkondukos ĉi tie la rusajn lingvon, leĝaron kaj reĝimon”.

Marte 1917 en Ruslando okazis la revolucio. La potenco formale transiris al la Provizora Registaro. La ukraina popolo plifortigis propran naciliberigan movadon. 17.03.1917 en Kijivo oni deklaris formiĝon de Ukraina Centra Konsilio. En majo 1917 Provizora Registaro rifuzis

aŭtonomecon por Ukrainio, eĉ ne la tujan, sed perspektive.

En jenaj cirkonstancoj Edmond Privat aperigis sian artikolon pri Ukrainio en la ĝeneva ĵurnalo “La Nation”<sup>4</sup>. Tiu ĉi artikolo montras, ke E. Privat tre bone orientiĝis en la ukrainaj aferoj kaj subtenis strebon de la ukraina popolo al la sendependeco.

Ĉi junie pasis 100 jaroj de la aperigo de tiu artikolo kaj ni proponas ĝin esperantigintan al la nia legantaro.

**(Trovis, esperantigis kaj komentis  
Viktor Jaskovec)**

<sup>4</sup> Edmond Privat, “Le réveil d’une grande nation” // “La Nation” № 2, 9-15.06.1917, p. 4 (vd. <http://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k65232151/f4.item>).

*Edmond PRIVAT*

## LA VEKIĜO DE GRANDA NACIO

Tiuj, kiuj inter militantajn naciojn lanĉis la noblan devizon “por la rajtoj kaj sendependeco de la popoloj”, ne devas esti surprizitaj, ke tia laŭta alvoko ankaŭ reeĥis malproksime. Ankaŭ ili devas malpli bedaŭri pri tio, kaj oni miras pro tio, ke hodiaŭ jen unu jen alia fervora ĉampiono<sup>5</sup> de Entento kampanjas kontraŭ la naciecoj de Ruslando.

En la ĉielo de aŭgusto 1914 ĉiuj sklavigitaj popoloj de la orienta Eŭropo ekvidis la brilantajn radiojn de espero, kiuj varmigis la korojn opresitajn per multjara funebro. Sed la carisma reĝimo baldaŭ vualis tiun tro klaran lazuron kaj la okcidentaj demokratioj, konfrontitaj kun danĝera malamiko, devis silenti, por kontentigi la ofendiĝeman aliancanon. Oni eĉ vidis, ke tia belga idealisto, kiel s-ro Georges Lorand<sup>6</sup>, lanĉis al la naciecoj de Ruslando strangan alvokon al la rezignacio.

Tiun pezan nubon de sombra perspektivo kaj de nigra disreviĝo la rusa revolucio disŝiras per granda tondrobato: Pollando estas apartigita, Finnlando estas liberigita, Ukrainio organiziĝas kun senmezura entuziasmo kaj la stratoj de Kijivo estas flagitaj per flava kaj blua koloroj por ĉiuj naciaj kongresoj kunvenantaj tie.

Kaj en la tempo, kiam ĉi tiuj grandaj nacioj renaskiĝas al vivo, ĉu konvenas voĉo de la Okcidento, diranta al ili: “Haltu!”? Malgrandfiduloj, ĉu vi do timas la propran ombron, ke la realiĝo de viaj ideoj plenigas vin per angoro kaj diktas al vi tiujn amarajn vortojn?

Vi deziris emancipiĝon de la popoloj: tio estas farita. Viaj infanoj falis kiel herojoj por ĉi idealo: jen estas la tempo realigi ĝin. Sendube, Francio kaj Belgio ankoraŭ estas invaditaj kaj neniu forgesas tion, sed ĉu tio do estas rimedo por ilia liberiĝo – ĵeti la na-

<sup>5</sup> en la senco ‘porbatalanto’, ‘probatalanto’ – NPIV.

<sup>6</sup> Louis Georges Auguste Lorand (1860-1918) estis belga politikisto kiu apogis aŭtonomecon de Valonio. Li estis ankaŭ prezidanto de la belga Ligo de Homaj Rajtoj.

## nia historio

ciojn de la Oriento en la brakojn de la malamiko, rifuzante al ili la promesitan justecon?

Ruslando estas divers- kaj multkonsista. La ŝtatoj de la Alianco bezonas ĉiujn siajn popolojn. Hodiaŭ ili repuŝas la separatan pacon, sed kion ili faros morgaŭ, se ilin oni senkuraĝigos?

Mi bone scias, ke en Londono oni timas la “dismembrigon” de Ruslando. La gazetaro silentas pri la rusa proklamo al la poloj. “Morning Post” timas vekigon de Ukrainio. Anglio ofte estis tro miopa. La estonteco devas gvidi la nuntempon. Kiu ignoros tion, tiu perdos la fruktojn de siaj penoj kaj plenigos vane la senfundan barelon de antikvaj Danaidinoj.

Fari Prusion forta por uzi ĝin ĉi-momente kontraŭ Francio, poste deziri gigantan Ruslandon por detruĝi tiun Prusion, – al kio kondukas tio, se ne al senfina daŭrigo de tiu tro frivola politiko?

La vera saĝo postulas male – la senprokrastan realigon de tiom laŭdataj principoj: oni devas prepari ekde nun tiun refonditan Eŭropon, kie la estonteco havos malpli la grandaj ŝtatoj ol la konfederaciitaj popoloj.

Aŭstrio-Hungario direktiĝas al tiu koncepto. Anglio mem donis la ekzemplon koncerne plurajn siajn koloniojn. Nun ĝi sentas, ke finfine necesas ankaŭ redoni justecon al Irlando. Ĝi do ne devas timi Finnlandon aŭ Ukrainion!

Kvardek-miliona nacio, loĝanta sur la plej riĉaj teritorioj de la suda Ruslando, pretas pagi sian parton de la komuna ŝuldo interŝanĝe kontraŭ la politika subteno.

La danĝero por Anglio estus pli reala, se la ĉagrenita Ukrainio sin turnus al Germanio, kiu povus trovi tie iun avantaĝan ekonomian aliancon.

Do, se kontraŭstari Ukrainion traktante ĝin la “germana manovro”, tio signifas ludi por la reĝo de Prusio<sup>7</sup>.

\* \* \*

Ukrainio reprenos sian lokon inter la nacioj. Por restarigi sian ŝtaton, tiu agrikultura popolo bezonas eksterlandan kunlaboradon. La konkurado estas malfermita ekde hodiaŭ. Ne disdegnu tion. Ĉu dum du jaroj de la milito oni ne mokis la “utopiistojn”, kiuj parolis pri sendependa Pollando? Kiu ankoraŭ nun dubas, ke ĝi tamen establiĝos kiel granda reparacio de la historio, farita pro tiu milito tiom multekosta?

Ukrainio iam estis potenca ŝtato. En ties lingvo oni ankoraŭ parolas de Karpatoj ĝis Volgo. Kijivo, Odeso, Ĥarkivo, Rostovo kaj Poltavo estas ĉefurboj de ĝiaj provincoj, kaj Orienta Galicio kun Bukovino havas plimulton da ukraina loĝantaro.

Ne senkaŭze la armeoj de la caro ĉiam direktis siajn ofensivojn al ĉi tiu flanko, ansataŭ minaci Berlinon rekonkerante Poznanon por la poloj.

Antaŭ ĉio temis pri detruo de ĉi tiu lasta fajrejo de la ukraina kulturo lerte protektita de Aŭstrio. Mi neniam forgesos la aspekton de tiu terure dezertigita Orienta Galicio, kie printempe de la jaro 1915 mi povis vidi, laŭ kiu maniero episkopo Eŭlogo<sup>8</sup> kaj guberniestro

<sup>7</sup> Friedrich Wilhelm Viktor Albrecht de Prusio (1859-1941) sub la nomo Vilhelmo la 2-a en jaroj 1888-1918 estis la lasta germana imperiestro kaj samtempe la lasta reĝo de Prusio.

<sup>8</sup> Eŭlogo (Eŭlogij, Eŭlogius) estas klerika nomo de Vasilij Semjonoviĉ Georgijevskij (1868-1946), la rusa ortodoksa arkiepiskopo de Ĥolmo (1912-1914), poste – de Volinio kaj Ĵitomiro (1914-1919). Dum la okupacio de Galicio far ruslanda armeo (1914-1916), li estris la Rusan Ortodoksan Eklezion sur la okupita teritorio, persiste konvertante indiĝenajn ukrainajn grek-katolikojn al la rusa ortodoksismo.



Bobrinskij<sup>9</sup> subkomprenis la “liberigon” de la teritorio. La fermitaj lernejoj, la malpermesita lingvo, la deportita metropolito<sup>10</sup>, la preĝejoj forŝiritaj de ilia kulto, ĉio signifoplene diris pri tio, kia sorto atendus ĉi malfeliĉan landon en la okazo de la anekso.

Hodiaŭ la situacio estas tute alia. La rusa revolucio remetis tiujn demandojn sur la grundon de juro.

Ukrainio, ligita al Rusio ekde jaro 1654 per la libervola kaj duflanka traktato kun la caro, nun estas devolibera pro la falo de la suvereno. Ĝi, kune kun la Provizora Registaro en Petrogrado, devas ekzameni, kian formon ambaŭ nacioj intencas doni al iliaj novaj rilatoj.

La ukraina ŝtato estos demokratia kiel pro la volo de siaj kamparanoj tiel pro siaj malnovaj korporaciaj tradicioj.

La tasko, unuavice entreprenita de la politikaj gvidantoj de la lando, estas organizi ĉiujn naciajn fortojn, kaj ilia samlandano, s-ro Tereŝĉenko<sup>11</sup>, iĝinte ministro pri la eksteraj aferoj de Ruslando, dece observas kun kreskanta intereso la unuaniman penadon de sia naskolando.

Estas evidente, ke plu nenio povas embarasi Ukrainion rekonstrui sin. La eventoj montras tion sufiĉe, por ke plu oni eĉ ne bezonu pridiskuti ĉi punkton. Sed por la Okcidento estas esence scii, kiel ĉi tiu ŝtato sin rekonstruos. Ĉu ĝi estos sendependa? Ĉu ĝi retenos union kun Ruslando? Ĉu ĝi sin turnos en flankon de la nova Pollando? Tiuj demandoj okupos gravan unuan vicon ankoraŭ antaŭ la militfino.

**P.S.** La tagordo, voĉdonita de la franca Ĉambro la 4-an de junio, parolas pri “longdaŭra garantio de paco kaj sendependeco por la grandaj kaj malgrandaj nacioj, en la de nun preparata organizaĵo – la Ligo de Nacioj.”

Ĉi tio estas bonega formulo, kiu faras honoron al ĝiaj aŭtoroj kaj montras realan deziron konsideri volon, esprimatan de la nova rusa registaro.

Finfine, en tiu, *de nun preparata*, Ligo de Nacioj, la okcidentaj aliancanoj povos trovi garantiojn kontraŭ fragmentiĝo de la rusaj fortoj. Oni timas tiujn rekonstruojn de Pollando, Ukrainio, Finnlando ktp. pro la estontaj militaj konsekvencoj. Sed, kiel tre bone montris profesoro Edgar Rilhaud<sup>12</sup> en “L’Humanité” koncerne la polan armeon, ne estas necese, ke Ruslando trudu militan union al tiuj ŝtatoj, por ke iliaj armeoj estu

<sup>9</sup> Georgij Aleksandroviĉ Bobrinskij (1863-1928) estis rusa militisto, la ĝenerala guberniestro (1914-1915) de la provizora Ĝenerala Gubernio de Galicio kaj Bukovino en Ruslanda Imperio. Li, kiel reprezentanto de rusa ŝovinismo, altrudis agreseman rusigadon en ĉiujn vivsferejojn sur la okupita teritorio.

<sup>10</sup> Andreo Ŝeptickij (1865-1944) ekde 17.01.1901 estis metropolito de la Ukraina Grek-Katolika Eklezio. La 2-an de septembro 1914 ruslandaj potenculoj arestis lin kaj deportis en Ruslandon, antaŭe al Kursko, kaj poste al prizono en Suzdalo.

<sup>11</sup> Miĥajlo Ivanoviĉ Tereŝĉenko (1886-1956) estis ukraina financisto, sukerfabrikisto, grandbienulo, mecenato. En la Ruslanda Provizora Registaro li estis financministro (marte-maje 1917) kaj ministro pri la eksteraj aferoj (maje-oktobre 1917).

<sup>12</sup> eble en la nomo estas eraro. Ŝajne temas pri artikolo de Edgard Milhaud “La Question polonaise et la Société des Nations” (“La pola demando kaj la Ligo de Nacioj”) en “L’Humanité” № 4769-4770 de 08-09.05.1917 (vd. <http://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k254909w/fl.item>). La aŭtoro Edgard Milhaud (1873-1964) estis aktivulo socialista kaj profesoro pri franca ekonomio.

## nia historio

ĉiam pretaj batali kontraŭ agresonto. Sufiĉas, ke ili partoprenu la Ligon de Nacioj kaj devontigu sin subteni ties volon de paco kaj la internacian forton kreotan laŭ la plano de Wilson<sup>13</sup>.

De alia flanko estas evidente, ke kia ajn granda estus Ruslando kaj kiom ajn multnombraj estus la nacioj, priloĝantaj ĝian teritorion, ne decas trouzi la plej bonajn principojn. Krom la penadoj de kelkaj grandaj popoloj krei siajn ŝtatojn, ekzistas lokaj insurekcioj kaj proklamoj de sendependeco de aparta urbo aŭ vilaĝo, servantaj pli por malordo ol por justeco, kaj kiujn oni ne devas interkonfuzi kun la veraj naciaj movadoj.

Sed kiom bedaŭrindaj estas tiuj devioj, tiom erare estus ne distingi ilin de la ceteraj.

<sup>13</sup> Thomas Woodrow Wilson (1856-1924) – la 28-a Prezidento de Usono (1913-1921).

## nia kalejdoskopo



► La 11-an de julio la redaktoro de „Ukraina Stelo“ Volodimir Paĉjurko renkontiĝis kun la direktoro de la Franko-Instituto de la Ukrainia Nacia Sciencakademio d-ro prof. Jevhen Naĥlik. Dum la preskaŭ duhora konversacio s-ro Jevhen rakontis pri la apero de la unua volumo de la Franko-enciklopedio. En la dua volumo aperos artikolo pri Leontij kaj Orest Kuzma-j. Al la Instituto estis transdonitaj la libro kun esperantigitaj verkoj de la poeto, la broŝuro kun la materialoj de la


pasintajara scienc-praktika konferenco, la poemaro „Velkinta foliaro“, tradukita de Denteto, kaj la numero de „Ukraina Stelo“ (3/2016). La direktoro invitis V. Paĉjurkon prelegi septembre ĉi-jare antaŭ la personalo de la Instituto pri la popularigo de la literatura Franko-heredaĵo far ukrainaj esperantistoj.

### EROŜENKO EN LVIVO

► Nemultaj esperantistoj scias, ke en Lvivo estas la Eroŝenko-strato, nomita omaĝe al la legenda ukraindevena esperantisto kaj verkisto Vasil Eroŝenko.

La neordinara, aventurplena vivo de Eroŝenko, lia verkista talento inspiris la skulptiston Jevhen Dzindra (ukr. Євген Дзіндра) skulpti lian buston. Ĝi estis skulptita en la jaro 1969 en la tekniko „forĝita kupro“.

La busto troviĝas en la Nacia muzeo en Lvivo.



# PROPOSITAJ PRELEGOJ POR LA KOLOKVO EN LA KADRO OKT-2017

*Andreas EMMERICH,*  
*vic-prezidanto de la Germana E-Asocio*

## KONGRESAJ PAROLADOJ DE L. L. ZAMENHOF KIEL MANIFESTO DE ESPERANTISMO



En la unuaj universalaj kongresoj de Esperanto estis tradicio, ke la kreinto de Esperanto, L.L.Zamenhof, faris paroladon malfermigan. Ĉiujare li dediĉis sian paroladon al speciala temo, sed aperadis preskaŭ en ĉiu jaro iuj rimarkoj pri la interna ideo de Esperanto, pri esperantismo. La lastan kongresan paroladon faris Zamenhof okaze de la malfermo de la universala kongreso en Kraków en la jaro 1912. Li ne plu volis esti ekde tiam la „majstro“, li preferis rezigni pri tiu rolo kaj volis lasi la paroladojn al libere elektitaj personoj.

Zamenhof paroladis ankaŭ dum aliaj okazoj. Kelkaj el tiuj paroladoj enhavas menci-ojn de la interna ideo, kaj mi traktos tri el ili: La paroladon en la Guildhall en Londono en la jaro 1907, tiun ĉe la malferma kunveno de UEA en la jaro 1909 kaj tiun ĉe la solena malfermo de la Ruslanda esperantista kongreso en la jaro 1910.

La parolado en la unua universala kongreso komenciĝas per la vortoj „Mi salutis vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio...“, kaj jam en tiuj vortoj ni trovas la kernon de la esperantismo. Zamenhof rigardis la tutan homaron kiel familion. Tio estis en sia epoko sufiĉe aŭdaca pretendo. Certe ĝi ne estis nova ideo aŭ eĉ lia invento, sed almenaŭ ĝi ne konformis al la tiama ĝenerala spirito. Oni konsideru, ke tiam esprimoj kiel „interpopola amikeco“ kaj similaj ne kiel hodiaŭ estis enmodaj, sed kontraŭe: Najbaraj landoj estis „heredaj malamikoj“, kaj militi kontraŭ ili ŝajnis al multaj memkomprenebla afero, same kiel la supereco de la propra kulturo kompare al la aliaj. Zamenhof esprimis klare sian homaranisman idealon en la sama parolado, nomante la homojn „Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiujn egalajn ideojn, egalajn Diojn en siaj koroj...“ La religia aspekto reaperos malsupre. Fakte oni iom sentas, ke mankas en tiu nombrado mencio pri egalaj rajtoj.

Pli malsupre Zamenhof diras: „...mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo.“ Tre rimarkinde ŝajnas al mi, kiasence li uzas la vorton „religio“. Religio laŭ mia sento estas ligita al kredo je iu dio (aŭ diaro), sed ne je partio aŭ nacio, kvankam ofte konstateblas en la mondo religieca kredo je iu nacia aŭ politika teorio. La mondo devis tion sperti kelkajn jarojn post la morto de Zamenhof en pluraj formoj. Oni havas la impreson, ke Zamenhof jam sentis tiujn pensmanierojn en sia epoko kaj kvazaŭ moke uzis tiun esprimon.

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

La parolado finiĝas per la fama „Preĝo sub la verda standardo“. Zamenhof, kvankam mem estante judo, firme postulis la egalvaloron de ĉiuj religioj kaj religianoj (li mencias kristanojn, hebreaĵojn kaj mahometanojn, sed ŝajnas, ke tiuj tri religioj estas ekzemploj kaj ĉiuj aliaj religioj estas inkluditaj). Li kvazaŭ kreis sintezon de la nomitaj religioj, ŝanĝante la vorton „Dio“ al „tiu alta morala Forto“.

Tiuj ĉi ekzemploj montras, ke Zamenhof vidis sin en la tradicio de racionalisma epoko kaj sekve ankaŭ en tiu de la liberalismo. La proksimeco de liaj ideoj al tiuj de la usona deklaro pri sendependeco, verkita per Thomas Jefferson, estas klare perceptebla: „Ni opinias, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj, dotitaj fare de la Kreinto per certaj necedeblaj rajtoj...“.

En sia parolado en la dua universala kongreso, kiu okazis en la jaro 1906 en Genevo, Zamenhof rakontis, kiel la ideo pri la internacia lingvo venis al li dum lia infaneco en Bialistoko. Ni ĉiuj konas tiun historion. Kaj li longe kaj detale klarigas, kio estas la interna ideo de la esperantismo. Laŭ Zamenhof, Esperanto havas du flankojn. Unu estas la praktika flanko. Tio signifas, ke ĉiu homo uzanta Esperanton, negrave por kiuj celoj, estas esperantisto. Do eĉ homo, kiu uzas la internacian lingvon „por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj“, estas esperantisto. Tio estas simple difino. Sed alia flanko, kiu laŭ Zamenhof – kaj por Zamenhof – estas multe pli grava, estas la ideo flanko. Tiu ĉi ideo estas „frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.“ Fakte nur pro tiu homama ideo Zamenhof dediĉis sian vivon al la kreado de internacia lingvo. Leginte liajn paroladojn kaj aliajn verkojn, kaj konante lian vivon, oni ne povas imagi, ke li estus kreinta Esperanton nur pro praktika utilo. Tamen li konscias pri la estonta destino de Esperanto: „Venus iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo...“

Restas la demando, ĉu Zamenhof ĉi tie pravas. Al mi ŝajnas, ke li montris ĉi tie maloptimismon, je kiu li mem ne kredis. Se Zamenhof vere kredis, ke Esperanto taŭgus al tiuj noblaj celoj nur dum la periodo de disvastiĝo, ĉar poste ĝi estos „normala“ lingvo, ĉiuj klopodoj estus sensecaj. Oni eĉ ne devus strebi la disvastigon de la internacia lingvo. Sed Zamenhof neniel indikis, ke li intencis tiel limigi sian lingvon. Male: Esperanto estas lia donaco al la tuta homaro. Eble lia rimarko havas alian sencon. Certe oni komprenas, ke Esperanto, fariĝinte la universala helplingvo en la mondo, ŝanĝos sian karakteron tiel, ke kongreso ne plu okazos, aŭ ke la Pasporta Servo ne plu funkcios kaj tiel plu. Sed tamen la benoplena efiko de la lingvo restos, eĉ se multaj ne plu konscios pri ĝi, ĉar ĝi estos „normala“. Same ni profitas el la metra sistemo, kvankam apenaŭ iu konscias pri la granda progreso, kiun ĝi ebligas. Esperanto certe estas granda kaj grava paŝo survoje al la etika plibonigo de la homaro, kaj tio ne perdiĝos.

Cetere Zamenhof fine de tiu parolado mencias, ke la anoj de la interna ideo, do ankaŭ li, „estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj.“ Tiun vorton, laŭ lia timo aŭ sperto, uzis liaj malamikoj mokintence. Fakte Zamenhof ankaŭ ĉi tie ne nur pravis, sed parolis tre saĝe. En nia tempo montriĝis, ke utopioj ja povas realiĝi – ĉu en la politiko, ĉu en la tekniko. Kiu ne kredas je utopioj, tiu ne estas realisto. Tial mi, same kiel Zamenhof, estas fieraj pri tiu nomo utopiisto.

La tria universala kongreso okazis en la jaro 1907 en Kembriĝo (Cambridge), Bri-

tujo. Tie Zamenhof denove emfazis la gravecon de la interna ideo de Esperanto kaj klarigas, ke temas unuavice pri idealisma afero: „La Kembriĝanoj akceptas nin hodiaŭ ne kiel komercistojn, kiuj alportas al ili profiton, sed kiel apostolojn de ideo homara...“. Tre gravas por li, „ke la homoj vidas en la esperantismo ne sole aferon de egoisma oportuneco, sed gravan ideon de intergenta justeco kaj frateco...“ Ĉi tie denove aperas la esencaj nocioj, kiujn li jam uzis en la pli fruaj paroladoj: justeco kaj frateco. Kompreneble Zamenhof ne malaprobas la uzadon de la internacia lingvo por praktikaj aferoj – tion montras, ke li diris „ne sole“, sed tamen por li la interna ideo, al kiu laŭ li servu „la noblaj homoj de ĉiuj popoloj“, pli gravas.

Zamenhof uzis en siaj unuaj paroladoj grandan patoson, kiu iom malfortiĝas en la malfruaj paroladoj. Por ni, kiujn separas preskaŭ unu jarcento de tiuj paroladoj, ilia patoso jam ŝajnas iom eksmoda, troigita. Sed komence de la XX-a jarcento tio estis pli kutima stilo. Kiel ekzemplo servu la vortoj de Zamenhof: „...ni, esperantistoj-batalantoj, certe vidas en nia standardo ion alian: ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado...“ ktp. La verda standardo kompreneble estas la simbolo de la esperantismo, kaj la esperantistoj-batalantoj estas tiuj, kiuj estas ne nur uzantoj de la internacia lingvo, sed ankaŭ anoj de la interna ideo.

La devizo de tiuj ideoj esperantistoj estas nun precize formulita: „Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.“ Tio aŭdiĝas sufiĉe objektivite, malpatose kompare al aliaj vortigoj, precipe pro la uzo de la subjunktivo „povus“: Tio signifas „povus, se ili volus (sed ili nuntempe ne volas)“; ĉiukaze, Esperanto mem ne volas sintrudi al la homoj, ĝi estas nur oferto, kaj la homoj akceptu ĝin, se ili volas. Neniu estas devigata fariĝi esperantisto, ĉio estas libervola. Mankas – bonŝance – tendenco mesii. Precipe la esperantismo ne volas enmiksi sin en la internan vivon de la gentoj, ĝi volas resti nepre neŭtrala.

Antaŭ la ĵus traktita difino, Zamenhof citis la konatajn versojn „Sur neŭtrala lingva fundamento/Komprenante unu la alian,/La popoloj faros en konsento/Unu grandan rondon familian. Tiuj versoj, kontraŭe al la sekvanta difino, esprimas iun esperon, kiu el mia vidpunkto ŝajnas iom troigita, eĉ naiveca; cetere, Zamenhof troviĝas en kontraŭdiro al la dua parolado, ke Esperanto iam perdos sian karakteron idean: Aŭ Esperanto estos „normala“ lingvo, aŭ ĝi gvidos al „unu granda rondo familia“. Ambaŭ rezultoj ne eblas. Laŭ mia konjekto la estonteco povas esti ie en la mezo: Esperanto, iam ĝenerale disvastiĝinte, helpas al la intergenta kompreniĝo, do estas progreso, sed ĝi kompreneble ne haltos militojn aŭ aliajn kverelojn.

Post la universala kongreso en Kembriĝo, Zamenhof faris paroladon en la Guildhall en Londono. Tiu parolado estas interesa, ĉar ĝi estas plia ekzemplo por la idealismo, la utopiismo de Zamenhof. Kun patoso li deklamas: „Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros.“ Zamenhof, kiu tiel ofte donis ekzemplojn de sia modesteco, verŝajne nekonscie uzis tiun malmolestegan metaforon: Esperanto, respektive ĝia kreinto, kiel alportanto de la lumo al la mondo, al la homaro. Zamenhof kiel nova Prometeo, kiu ne la fajron alportas, sed lumigan ideon pri paco kaj interkompreniĝo. Kaj li daŭrigas: „Venus iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ la aliaj.“

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

En la sama parolado Zamenhof defendas sin kontraŭ la kulpigo, ke esperantistoj estas malbonaj patriotoj. En tiu rilato li diras, ke „tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismen kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon inter la popoloj...“. Denove aperas tiuj du kernaj nocioj: justeco kaj frateco. Cetere patriotismo kaj esperantismo ne estas malakordigeblaj; ĉar ami sian landon ne signifas malami la aliajn; nur la – de Zamenhof tiel nomita – pseŭdo-patriotismo kompreneble estas malo al la esperantismo. Nur laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ la aliaj landoj. Laŭ Zamenhof, la vera patriotismo kaj la esperantismo kompletigas unu la alian, ĉar ambaŭ predikas amon.

La parolado, kiu okazis en la 4a Universala kongreso en la jaro 1908, temis ĉefe pri la problemoj de la lingvaj reformoj, sekvinte la Ido-skismon. Tamen en la fino ne malmankis aludo al la esperantismo: Zamenhof parolas pri la Universala kongreso kiel „pure homara festo“. Li vidas la kongresojn kiel „ekzercanta kaj edukanta antaŭparolo por la historio de la estonta interfratigita homaro“. Por li, multe pli ol iuj eksteraj lingvaj detalaĵoj gravas la idea esenco kaj la celo, tio estas la esperantismo.

La parolado en la 5a Universala kongreso en la jaro 1909 estis nekutime mallonga kaj sufiĉe formala. Nur komence de ĝi Zamenhof nomigas la kongreson „komuna festo“ kaj mencias marĝene la saman ideon, la samajn aspirojn kaj esperojn (jen unu el la maloftaj vortludoj!). La patoso de la unuaj paroladoj ĉi tie mankas tute.

En la sama jaro, 1909, Zamenhof parolis ankaŭ ĉe la malferma kunveno de UEA. Ĝi estas mallonga parolado, sed ankaŭ ĉi tie reaperas aludoj al esperantismo: Esperanto estu lingva neŭtrala fundamento „por ĉiuj interhomaj rilatoj kaj servoj“, kaj Zamenhof vortigas sian esperon, ke el tio „rezultos pli da amikeco kaj estimo inter la gentoj“. Do ankaŭ ĉi tie la homaranismo, kaj pri ĝi temas ĉe la esperantismo – estas la plej grava celo, pli grava ol iu ekstera lingva formo aŭ detalaĵo. Cetere Zamenhof finas sian mallongan paroladon esprimante sian esperon je baldaŭa realigo de esperantismo, kio – kiel konate – ĝis nun bedaŭrinde ne sukcesis. Ankaŭ en ĉi tiu parolado mankas la patosemo, kiu estis tiel tipa por la unuaj paroladoj.

En la jaro 1910 la Universala kongreso okazis unuafoje en neeŭropa lando, en Usono. Jen denove parolado, en kiu reaperas iom de la patosemo de la unuaj paroladoj, eble pro la entuziasmo, kiun Zamenhof havis por la usonaj ŝtato kaj socio. En Usono kelkaj de la valoroj, kiujn alstrebas ankaŭ la esperantismo, estis realigitaj – tute kontraŭe al, ekzemple, la rusa imperio, en kiu Zamenhof parolis unu jaron antaŭe kaj kiu estis ja lia patrujo! En tiu epoko, la rusa imperio, kies estro estis la caro kaj al kiu apartenis Litovio, Pollando, Ĉednupra Ukrainio kaj aliaj subpremitaj landoj, estis opresema, neprogesinta sistemo, en kiu la malamo inter la gentoj kreskadis. Kontraŭe al tio, en Usono la enmigrintoj havis samajn rajtojn kaj kunfandiĝis pace al unu popolo. Eĉ se Zamenhof vidas la situacion eble iom pli malkritikeme ol li devus, li pardonendas, ĉar la diferenco al la situacio en la rusa imperio estis tiel grandega. En lia parolado, li diras, ke la esperantismo strebas ne malpli ol „fortigitan kaj spirite altigitan homaron“. Kia pretendo! Ĝi estas nesuperebla pretendo, tamen ne sen ekzemplo; sed ĉiuj aliaj, kiuj en la historio de la homaro simile pretendis „altigi“ la homaron per ia sistemo (plej ofte politika aŭ religia, ne lingva), malkovriĝis esti plej grandaj friponoj aŭ eĉ krimuloj, aŭ almenaŭ iliaj

ideoj estis misuzataj per iliaj adeptoj. La ideoj de Zamenhof estas vere homamaj: „...ĉar ni komprenas nin kiel samgenteroj, havante nenian bezonon humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian.“

Fine, mi lasas lin mem resumi kio estas la interna ideo de Esperanto, do la esperantismo: „Sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.“ Zamenhof diris tion en sia parolado okaze de la 8a Universala kongreso en la jaro 1912, kvaronan jarcenton post la publikigo de Esperanto. Post tiu parolado li formetis la oficialan rolon en Esperantujo. Sed ĉio direnda estis dirita. La esperantismo kiel esprimo de la homaranismo neniam forigeblas el tiu ĉi mondo; tiu ideo ekzistos dum la homaro ekzistos. Tio restos la eterna merito de Zamenhof.

**nia kalejdoskopo**

► Omaĝe al la jaro de Zamenhof la Pola Poŝto eldonis poŝtkarton, sur la adresflanko de kiu estas prezentita la kovrilo de la Unua libro por poloj (1887). La presita marko kun la nominalo A enhavas la surskribon en du lingvoj (pole kaj Esperante): Ludoviko Zamenhof kreinto de la lingvo Esperanto. La eldonkvanto – 10000 ekz.



► Ankaŭ la Ukraina Poŝto omaĝis la centan datrevenon de la mortotago de L. Zamenhof. Laŭ la peto de UkrEA ĝi emisiis (en la servo „Propra marko“) la respektivan markon kun la portreto de Zamenhof. La nominala valoro „V“ koincidas kun la afranko de la ordinara letero enlande. La portreton gravuris Niko. La marko aĉeteblas en la libroservo de UkrEA kontraŭ 10 UAH (+4 UAH por transsendo) laŭ la adreso: p.k. 26, Luck-18, UA-43018. La monon prefere ĝiru al la karto 4149 6258 1328 2919 en la PrivatBanko al Voloŝin Mikola Volodimiroviĉ.

► Junie Vasil Antonjuk aĉetis ĉirkaŭ 50 librojn el la biblioteko de fama Iviva esperantisto Olesandr Koroleviĉ (1913-1995). La plej valoraj libroj estos eksponitaj en la muzeo de Oresto Kuzma. Aliaj estos donacitaj al la plej aktivaj partoprenantoj de la Oresto Kuzma-tagoj.



Nina DANILJUK, u. Luck

## ARTAJ KVALITOJ DE LA ORIGINALA ESPERANTA POEZIO DE LUDOVIKO ZAMENHOF

Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859–1917) kreis ne nur bazan formon de Esperanto, sed donis al ĝi “animan spiriton” kaj prilaboris diversajn lingvostilojn: oficialan (dokumentoj por rilatoj kun diversaj institucioj), sciencan (gramatika terminologio, vortprovizo), parolan (paroladoj dum renkontiĝoj kun esperantistoj), korespondan (leteroj), oratoran (paroladoj dum oficialaj kunvenoj kaj kongresoj) kaj tre gravan beletran (originalaj verkoj kaj tradukoj). Ĉiu lingvo, ankaŭ artefarita, povas prosperi nur kiam havas disvolvitajn ĉi tiujn lingvostilojn. Estas bone, ke la unua generacio de Esperanto-posedantoj multe okupiĝis pri tio.

Laŭ la vortoj de Degenkamp “miriga estas la rialto inter la lingvo kaj literaturo: la literaturo ĝermas kaj kreskas el la lingvo kaj inverse – la lingvo nutriĝas kaj kreskas pere de sia literaturo” [cit. laŭ Tvarožek (2004), p. 94]. Por filologoj jam estas pruvita fakto, ke literatura formo de la lingvo preskaŭ ĉiam estas prilaborita de verkistoj (ekz. William Shakespeare en la angla, Johann W. von Goethe en la germana, Dante Alighieri en la itala, Adam Mickiewicz en la pola, Aleksandr Puŝkin en la rusa, Taras Ŝevĉenko en la ukraina k.t.p.). Estas mirinde, ke Zamenhof, laŭ la profesio ne filologo kaj ne verkisto, komprenis la grandegan rolon de beletro en la disvastiĝo de la internacia lingvo. “Tio, ke L. Zamenhof imagis al si Esperanton kiel lingvo de la literaturo, kaj ne de tekniko, komerco aŭ scienco, – opinias Eduard V. Tvarožek, – estis la ĉefa kialo, ke Esperanto estis tiel favore akceptita fare de la homa socio” [Tvarožek (2004), p. 7].

Por esperantistoj kaj Esperanto-movado la literatura agado de la Aŭtoro havis grandan signifon. Ludoviko Zamenhof elprovis la kvalitojn de Esperanto kiel literatura lingvo, ellaboris ĝiajn normojn kaj en poetika, emocia formo transdonis ĉefajn ideojn de Esperanto-movado. Liaj originalaj verkoj ne multas: “Proverbaro” (1910), “Lingvaj respondoj” (1912, 1913) kaj nur 9 poeziaĵoj. En la “Unua libro” (1887) jam aperis 2 verkoj: “Mia Penso” kaj “Ho, mia kor”. En la revuo “La Esperantisto” (1889) estis publikigita “Al la Fratoj”. En la eldono de Antoni Grabowski “Liro de la Esperantisto” (1893) troviĝas 2 verkoj “Al la “Esperantisto” kaj “Saluto al “Verda radio”. Poste aperis “La Espero”, kiu kun la muziko de Félicien Menu de Ménil en la jaro 1909 fariĝis la himno de esperantistoj, kaj “La vojo” (1896). Dum la 1-a Kongreso en Bulonjo ĉe maro (1905) estis prezentita de la Majstro mem la programa poeziaĵo “La preĝo sub la verda standardo”. La lasta poeziaĵo “Pluvo” estis publikigita komence en la revuo “Tutmonda Espero” (1909) kaj poste en “British Esperantist” (1914). Kiel skribis la skota E-Verkisto kaj tradukisto William Auld, “evidente, L. L. Zamenhof estas la unua “inventinto” en nia poezio... La poemoj de L. L. Zamenhof nature okupas tute specialan lokon en la Esperanta movado...” [Auld (1958), p. 12–13].



Ĉiuj poeziaĵoj (oni ofte nomas ilin “poemoj”) estas diversnivelaj kaj estas mal-same pritaksitaj de la kritikistoj. Ekzemple, fama hungara E-poeto kaj tradukisto Kolo-mano Kalocsay skribis, ke originalaj verkoj de Zamenhof “havas netakseblan valoron kaj utilon, sed precipe liaj grandnombraj tradukoj efikis al la lingvo riĉige, vivige, ma-turige” [Gvidlibro (1979), p. 132]. D-ro Joh. Dietterle, kiu kolektis kaj ordigis por el-dono verkojn de Ludoviko Zamenhof, diris, ke ili prezentas “la tutan programon de Zamenhof en poezia formo, ne nur rilate la novan lingvon, sed ankaŭ rilate ilian poli-tikan pozicion kaj religian sentadon”[Zamenhof (1929), p. 586]. La skota E-verkisto kaj tradukisto John Francis opiniis, ke “la poemojn de Zamenhof, nurajn emociajn lirikaĵojn, oni ne povas serioze kompari kun la ĉefaj juvelaĵoj de la grandaj naciaj lit-eraturaj, sed por destinita celo ili estis perfektaj: sufiĉe rimriĉaj kaj skande striktaj por sugesti la teknikajn eblaĵojn de la lingvo nova, sufiĉe tintaj por faciligi parkeron, sufiĉe individuaj laŭforme por supozigi senperan kreadon, sufiĉe simplaj por allogi tre vari-ajn homtimojn, kaj sufiĉe emociaj por pruvi la riĉecon de la lingvo”[cit. laŭ Gvidlibro (1979), p. 134]. Laŭ mi, la aŭtoro de ĉi tiu eldiro estis tro severa, nominte la po-emojn “nuraj emociaj lirikaĵoj”. Mi opinias, ke ili havas artan valoron, kiu montras, ke Ludoviko Zamenhof estis talenta poeto. Tion mi volas pruvi en mia artikolo.

La unuaj poeziaĵoj “Mia Penso” kaj “Ho, mia kor”, laŭ la vortoj de la angla E-verkisti-no Marjorie Boulton, “estas profunde personaj...inter la tre malmultaj intimaj konfesoj de Zamenhof”[cit. laŭ Gvidlibro (1979), p. 132]. En la unua temas pri parolo kun la junulino, al kiu la aŭtoro metaforike diras, ke li “*la junecon...metis sur la altaron De la devo or-donanta*”, ke li “*fajron sentas interne*” kaj volas vivi “*En espero – sen doloro*” [cit. laŭ: 3, p. 589]. La dua estas poetika alvoko al la koro kun la peto “*ne bati maltrankvile*”. Ambaŭ poeziaĵoj estas skribitaj, verŝajne, kun influo de la sentimentala stilo, sed ni kom-prenas, ke temas pri la sentoj de la Majstro, kiu esprimis sian maltrankvilon, prezentante la kreaĵon – Esperanto – al la mondo. Kiel stilistikaj figuroj servas: la 3-foja ripetado de la koncepta vorto “*espero*”, la dialoga formo en la 1-a poeziaĵo. Tre gravas la alparola frazo “*Ho, mia kor*”, kiu ne bezonas respondon kaj faras la ciklan formon (la komenco kaj la fino de la strofo), la retorika demando “*Ĉu mi ne venkos en decida hor?*”, kiu fakte sig-nifas: “*Jes, mi venkos!*”. Krome, estas la kruca rimo laŭ la skemo *abab* en la 2-a katreno kaj laŭ la skemo *ababcdcd* en la 8-linia strofo de la 2-a verso [3, p. 589].

La poeziaĵo “Al la Fratoj” estas alvoko al esperantistoj labori por la malproksima celo: “*Glora la celo, sankta l’afero, La venko – baldaŭ ĝi venos...*”. Jam ni vidas bonan ekzemplon de la tiel nomata “poezio kun civitanaj motivoj”, kiu inspiras kaj instigas samideanojn atingi la celon:

*Tiam atendas nin rekompenco*

*La plej majesta kaj riĉa:*

*Nia laboro kaj pacienco*

*La mondon faros feliĉa!* [3, p. 588].

Nenie estas pligustigita la senco de la laboro, sed tre signifa estas la frazo: “*Iras senhalte via laboro Honeste kaj esperante*”, kaj ni komprenas, ke la laboro estas per Esperanto kaj por Esperanto. Denove ni trovas la samajn konceptajn vortojn “*nokto sen luno*”, “*espero*”, kiujn ni vidis en la antaŭa poeziaĵo, sed pli granda estas la kredo,

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

ke malgraŭ staras “*La celo en malproksimo, Ni ĝin atingos per potenco De nia forta animo*”. Do, jam videblas la trajtoj de la revolucia himno:

*Forte ni staru, brave laboru,  
Kuraĝe, ho nia rondo!  
Nia afero kresku kaj floru  
Per ni en la tuta mondo!* [3, p. 588].

Estas multe da ripetataj vortoj kaj frazoj (*Veku, ho veku, veku konstante; Voku, ho voku, ripetadante*), ekkriaj kaj demandaj propozicioj, kiuj emociigas la tekston

*(Forte ni staru, fratroj amataj, por nia sankta afero!  
Ni bataladu kune tenataj per unu bela espero!  
Kie vi estas, kion vi faras, ho, karaj fratroj vi miaj?).*

Ĝi havas 15 strofojn po 4 linioj kun la rimo *abab* kaj bone organizita ritmo. Kolomano Kalocsay opinias, ke la poemo “estas iom tro longa por sia temo kaj la ripeteto plurfoje ne pliigas, sed malpliigas la efikon”, sed “kortuŝa intima alparolado sendube estis altira kaj kunvena por la unuaj samideanoj de iuj fruaj jaroj” [Kalocsay (1979), p. 133].

La poeziaĵoj “Al la “Esperantisto” kaj “Saluto al “Verda Radio” estas tiel nomataj “gratulversoj.” En ili estas substrekita granda rolo de la periodaĵo en Esperantomovado. Ni scias, ke la revuo “La Esperantisto” kaj la almanako de originalaj verkoj “Verda Radio”, eldonita en Rigo, tre utilis por la disvastiĝo de Esperanto, kunigo de esperantistoj, influis civitanan opinion. Pro tio Zamenhof diras, ke “*l’unua muro estas trarompita*” kaj “*la celo estos alvenita*” [3, p. 591].

Ankaŭ la poeziaĵo “La vojo” estas sufiĉe altkvalita. Jen estas la komenco:

*Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l’sorto, nek moko de l’homoj.  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la voj’ elektita* [3, p. 587].

En la artikolo “Zamenhof – la unua grava verkisto en Esperanto” (aperis en “Juna amiko” en la jaro 1999. kaj poste en “Libera folio” en la jaro 2005) la islanda E-verkisto Baldur Ragnarsson skribis: “El tiuj poemoj *La Vojo* elstaras kiel metafora esprimado; la titolo mem estas metaforo, signifanta la kuraĝan iradon de la esperantistoj al la celo, tio estas la fina venko aŭ akcepto de Esperanto kiel internacia komunikilo kaj pacigilo de la homaro. La poeto klare konscias la malfacilaĵojn, kiuj atendas la laboron de la esperantistoj, necesas ne flankiĝi de la celita vojo, malgraŭ malrapida progreso...” [4]. En la poeziaĵo la vortoj “*densa mallumo*”, “*nokto*” montras tiutempan situacion kaj la celon de esperantistoj “*briletas... simile al stelo*”. La aŭtoro komparas esperantistojn-vojirantojn kun la semantoj: kvankam “*cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, – ni semas kaj semas konstante*”. Estas ripetataj la signifaj vortoj: *l’espero, l’obstino* kaj *la pacienco* – la nomoj de la kvalitoj, kiuj povas helpi atingi “*la vojon celitan*”. Kelkaj frazoj de la poeziaĵo fariĝis tiom popularaj, ke jam estas uzataj kiel aforismoj,

ekzemple: *”Ni semas kaj semas, neniam laciĝas, Pri l’ tempoj estontaj pensante”;* *”Obstine antaŭen! La nepoj vin benos, Se vi paciencie eltenos”;* *”Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, Ni iru la vojon celitan!”;* *”Eĉ guto malgranda konstante frapante Traboras la monton granitan”;* *”Ni paŝo post paŝo, post longa laboro Atingos la celon en gloro”* [3, p. 587].

La poeziaĵo *”La preĝo sub la verda standardo”* estas bone kompilita kaj precize eldiras la celojn de Ludoviko Zamenhof. La aŭtoro uzis la konatan en multaj religioj formon de la preĝo al Dio. *”La verda standardo”* estas la simbolo de Esperanto, *”ĝi signas la bonon kaj belon”*. Evidente, ke la preĝo estas direktita al Dio, sed en la unuaj 4 strofoj la nomo forestas, tamen estas uzata pronomo *”Vi”* kaj substantivo, skribita per majuskla litero – *”Fort(ego)”*:

*Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
Fortego, la mondon reganta,  
Al Vi, granda fonto de l’ amo kaj vero  
Kaj fonto de vivo konstanta,  
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,  
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,  
Hodiaŭ ni preĝas* [3, p. 589].

Nur en la lasta 6-a strofo, kiu ne sonis dum la kongreso kaj ne estis publikigita en la *”Krestomatio”* pro religiaj kaŭzoj, aperas la nomo *”Dio”*: *”Ni ĉiuj de Di’ estas filoj”*. Laŭ mi, la 6-a strofo la plej ĝuste esprimas la ideon de unuiĝo kaj venko:

*Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,  
Antaŭen kun pacaj armiloj!  
Kristanoj, hebreoj aŭ magometanoj  
Ni ĉiuj de Di’ estas filoj.  
Ni ĉiam memoru pri bon’ de l’ homaro  
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro  
Al frata la celo ni iru obstine  
Antaŭen, senfine!* [3, p. 590].

Ludoviko Zamenhof parolas ĉi tie en inspirita, solena tono, uzante la futuran tempon de la verboj, pri la idealoj: *”Ni inter popoloj la murojn detruos”;* *”Amo kaj vero ekregos sur tero”*. Li uzas la ripetatajn vortojn: *al Vi*, la sinonimojn: *”potenca senkorpa mistero”;* *”Fort(ego)”;* *”Forto mistera”*. La petoj al Dio ne estas personaj, sed tuthomaraĵ: *”Redonu la pacon al la infanaro De l’granda homaro!”;* *”Donacu vi benon al nia laboro, Donacu vi forton al nia fervoro...”*. La poezio konsistas el ses 8-liniaj strofoj kun la kruca rimo *abab* komence kaj *ccdd* poste. Ĝi estas unu el la plej bonaj poemoj de la Majstro laŭ signifo kaj stilistika formo.

La lasta konata poeziaĵo de Ludoviko Zamenhof – *”Pluvo”* – estas alte taksita kiel bona, altkvalita, matura artverko. En la versaĵo la koncepta vorto estas *”pluvo”*, kies antonimo estas *”suno”*. Temas pri senĉesa pluvo, kiun vidas la lirika heroo, sed ĝi alportas ion novan kaj freŝan: *”Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras, Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas, Al la freŝo la koro min tiras”* [3, p. 592]. Ĝi estas tute simbola poeziaĵo, en kiu la aŭtoro, malgraŭ la pluvo kaj la malsano, havas esperon je la venko

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

de la idealoj. La 4-foja ripetado de la vortoj “*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas*” helpas reale “vidi” la bildon de la granda kaj longa pluvo. Kuniĝo de la samaj sonoj en la linio “*senĉese, senfine, senhalte*” fonetike “aŭdigas” la pluvon en niaj oreloj. La sentoj da la koro estas samtempe kaj malĝojaj (verŝajne pro malfacila peza laboro) kaj ĝojaj (ĉar jam estis sukcesoj). Tre gravas la linio: “*Mi revas pri l’ sun’, kiu baldaŭ aperos*”, kiu montras la optimisman kredon je “*amo kaj vero*” en la tuta mondo danke al Esperanto-movado. La poemo konsistas el 5 strofoj po 4 linioj kun la ŝatata de la aŭtoro rimo *abab*. Tute pravas Marjorie Boulton, kiu skribis, ke ĝi “vekas senton de vera bedaŭro, ke li ne skribis aliajn poemojn tiel personajn kaj artistismajn”[cit. laŭ Gvidlibro(1979), 134].

Aparte mi parolos pri la poeziaĵo “La Espero”, kiu estas la himno de esperantistoj ekde la jaro 1909. Ĝia titolo estas simbola kaj en la konscio de la esperantistoj estas kunigita kun la nomo *Esperanto*. La poezio komenciĝas per la konataj vortoj:

*En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento  
Nun de loko flugu ĝi al loko* [3, p. 586].

La vortoj “*nova sento*” nomas la senton de “*sankta amo*”, “*sankta harmonio*”, kiu aperos “*sub la sankta signo de l’ espero*”. La ripetata adjektivo-epiteto “*sankta*” substrekas la noblan ideon de *Esperanto* kaj la noblan laboron de la samideanoj. La antoni-moj *militanta* – *paca* montras du polusojn de kontraŭstaro: “*la mond’ eterne militanta*” kaj “*paca laboro*” de “*pacaj batalantoj*” por “*sankta harmonio*”. La metafora frazo “*Forte staras muroj de miljaroj Inter la popoloj dividitaj*” indikas la grandan dividiĝon inter la popoloj en la mondo de la lingva, politika, ekonomia k.a.

vidpunktoj. Per alia metaforo estas transdonitaj la rezultoj de la esperantista laboro: *Sed dissaltos la obstinaj baroj, Per la sankta amo disbatitaj*. Tre gravas la kvina strofo de la himno, kiu esprimas la ĉefan ideon de Esperanto kaj E-movado:

*Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian* [3, p. 586].

Do, la poeziaĵoj de Ludoviko Zamenhof pruvis grandajn eblecojn de Esperanto ne nur en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en la aparte signifa kampo de beletro, montris vastajn rimedojn por esprimi gravajn pensojn kaj profundajn sentojn. Mi opinias, ke tri poeziaĵoj de Ludoviko Zamenhof – “La Espero”, “La preĝo sub la verda standardo” kaj “Pluvo” estas tiom altkvalitaj, ke ilin eblas kompari kun famaj verkoj en la naciaj literaturoj. Mi konsentas kun la vortoj de la nederlanda E-verkisto kaj lingvisto Gerrit Berveling: “Sen ia hezito oni povas konstati, ke por Zamenhof ne estis senchave okupiĝi pri lingvo internacia, se en ĝi ne eblus verki ankaŭ poezie. La poezio mem miaopinie kunkreis la lingvon” [Berveling (2012)]. Krome, kiel substrekis Kolomano Kalocsay, “tiuj poemoj ankaŭ bonege plenumis sian destinitecon: entuziazmigis la komence tiel malgrandan aron de esperantistoj, vekis inter ili la senton de kunapartaneco, la konscion, ke ili laboras por nobla celo”[Kalocsay (1979), 134].

**Literaturo:**

1. Auld W. (red.) (1958) Esperanta Antologio. Poemoj 1887–1957. La Laguna de Tenerife: Imprenta Gutenberg, 640 p.
2. Baza Literatura Krestomatio (1982, 2-a eldono). Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 284 p.
3. Berveling, G. (2012) Zamenhof (1859–1917) ĉu nia unua poeto? en: <http://esperanto-ondo.ru/Ondo/207-lode.htm#11>
4. Zamenhof, L.L.(1929) Originala verkado. Antaŭparoloj – Gazetartikoloj – Traktaĵoj – Paroladoj – Leteroj – Poemoj / Kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & John, 607 p.
5. Kalocsay, K. (1979) Skizo de Esperanta literaturhistorio. En: Gvidlibro por supera ekzameno. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, p.132 – 279.
6. Ragnarsson, B. Zamenhof – la unua grava verkisto en Esperanto, en: <http://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2005/aperis/baldur1zamenhof/>
7. Tvarožek, E. V. (2004, 2-a eldono). Skizo de Esperanta literaturo. Bratislava: SKEF, 94 p.

**nia kalejdoskopo**

**INTERESAJ FAKTOJ**

► Sur la dorso de tiu ĉi foto, akirita en aŭkcio far V. Antonjuk, estas skribita nur dato kaj loko: La 13-an de aprilo 1924, Borislavo. La diversnacia Borislavo tiutempe estis grava loko de la eŭropa petrol- kaj ozokeritindustrio. Kiel estas indikite en Vikipedio, ĝi estas sola urbo en la mondo, situanta sur la industriaj nafto-gasa kaj ozokerita kuŝejoj kun pluraj fontoj de mineralaj kaj kuracaj akvoj. Kaj pri la E-movado en la urbo ni povas nur konjekti, supozi, mediti... Kaj serĉi, esplori, studi! Ja multloke la historio de E-vivo en nia lando restas terra incognita.



? La kvara inter la starantoj – V. Pacjurko.

► Anatolo Kofĥ, fama lviva esperantisto (1887 – 1964), konis persone Ludovikon Zamenhof, kelkfoje estis en lia domo en Varsovio. Sur la foto, farita la 15-an de decembro 1959 en la Lviva Domo de sciencistoj, kie okazis solena kunsido de la loka esperantistaro, dediĉita al la centjara datreveno de la naskiĝo de la Majstro, videblas parto de la partoprenintoj. Sidas de maldekstre dekstren: Anatolo Kofĥ, Izidora Voloŝĉak, Katerina(?) Kislova, Olesksandr Korolevic,



*Andreas KÜNZLI (Svislando)*

**ZAMENHOF, ĜENEVO 1906,  
KAJ RUSLANDO 2014  
Meditaĵo surbaze de la ĝeneva  
kongresparolado de L.L. Zamenhof**

**Zamenhof, Ĝenevo 1906**

„Mi venas el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la rajtoj de homo. (...) Ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la gentoj. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando – tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝis tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado intergenta. Terura estas la stato de aferoj en la multe-lingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! (...) En la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas. Oni scias, ke ne la Rusa gento estas kulpa en la besta buĉado (...), ĉar la Rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunkiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute tiaj samaj homoj, kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunkiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj!“ (Frazoj el la parolado de L.L. Zamenhof dum la dua Esperanto-mondkongreso en Ĝenevo, la 28an de aŭgusto 1906).

**Ruslando kaj Ukrainio en 2014**

Se ni komparas la aktualan situacion en Ruslando kaj Ukrainio kun la stato, kiun L.L. Zamenhof priskribis en la jaro 1906, ni devas konstati kun hororo kaj embaraso diversajn paralelojn kaj ke la situacio en la hodiaŭa Ruslando estas okulfrape simila, kvankam en ĝi

ne plu regas la caristoj, kiuj kolapsis en 1917, nek la komunistoj, kiuj fiaskis en 1991, kaj kvankam la cirkonstancoj kaj kaŭzoj parte eble estas iom aliaj. Malgraŭ tio ŝajnas, ke Ruslando nenion lernis el sia historio. Kelkaj aludaj komentoj pri la ĝeneva parolado de Zamenhof en komparo kun la aktuala situacio en Ruslando kaj Ukrainio.

**Unue:** En 1906, Zamenhof venis el lando, *kie multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la rajtoj de homo*. En 2014 ni konstatas, ke en Ruslando multaj milionoj da homoj daŭre malfacile batalas por la libereco, por la rajtoj de homo, kiuj en Ruslando estas draste limigitaj, parte eĉ abolitaj.

**Due:** En 1906 Zamenhof klarigis al la kongresanoj, ke *ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la gentoj*. Laŭ lia analizo *tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando - tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento*. Tio estas ankaŭ hodiaŭ la kazo. Rusoj *ĵetas sin kiel kruelaj bestoj* kontraŭ ĉeĉenoj, kartveloj, ukrainojkaj krude enmiksiĝas en la landoj de abĥazoj, osetoj, tataroj de Krimeo kaj aliaj, kun la celo restarigi la influon de Moskvo en tiuj landoj, kvankam ili deziras esti memstaraj kaj sendependaj. La militoj, kiujn la politika aventuristo kaj patriotisma dema-gogo Putin lanĉis kontraŭĈeĉenio, Kartvelio kaj Ukrainio, okazis pro *politikaj patrolandaj interesoj* – pli moderne oni dirus pro geostrategiaj kaj ekonomiaj interesoj. Pro la paranojo de rabkapitalisme pens-anta kaj aganta ŝtat-oligarkio, kiu akaparis la tutan politikan povon en Ruslando, kies naturajn resursojn ĝi ekspluatadas sen pozitive kaj fruktodone kontribui al la evoluado kaj estonteco de la lando, kiu timas perdi sian politikan influon, sian monon kaj siajn posedaĵojn kaj kiuriskas lanĉi militojn por defendi siajn interesojn, *multaj homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado intergenta* aŭ almenaŭsuferas kaj rapide mizeriĝas pro la egoismo, malkapablo kaj senrespondeco de la politikistoj, kiuj regas ilian landon. Kiom da milionoj da malriĉuloj vivaĉas en Ruslando, pri kiuj neniu parolas kaj interesiĝas, dum la oligarkoj kolektas milionojn da dolaroj en siajn poŝojn! Kvankam tio ne estas pruvebla, povas esti, ke Putin fariĝis la plej riĉa homo de la mondo, pli riĉa ol Bill Gates, ĉar tia celo kongruas kun lia psika ambiciumo superi ĉiujn aliajn.

**Trie:** *Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo*. La militoj en Ĉeĉenio de 1994-96 kaj 1999-2009 kaŭzis verŝajne minimume 150000 mortintojn, kaj la milito en Ukrainio, kiu komenciĝis en printempo 2014, kaŭzis ĝis nun 4700 mortviktimojn, pli ol 10000 vunditojn kaj pli ol 1 miliono da rifuĝintoj! La historio de la regado de Putin estas ununura historio de konstantaj skandaloj, agresoj, perfortadoj kaj militoj – kaj kontraŭ eksterlandoj, kaj kontraŭ la propra popolo, kiu naive adoras tiun dubindan ŝtatestron kiel duondion, gvidanton kaj savanton. Kiel tia historio ĝi restos en la memoro de la historiaj libroj de la libera mondo. Ruslando certe ne povos profiti de tiu „reputacio“, eĉ ne plu ĉe la kanajlaj ŝtatoj, kies gloraj tempoj pli malpli finiĝis.

**Kvare:** *En la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetas kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj*. La modernaj sovaĝuloj de 2014 estas diversaj anonimaj militbanditoj kun terorisma fono, kiuj migras kvazaŭ turistoj de milito al milito, do ankaŭ al Ukrainio, kie

ili helpas al la „separatistoj“ en Krimeo kaj Donbaso kun la apogo de Ruslando saboti kaj detru la ukrainan ŝtaton. La suferantoj de tiaj konfliktoj estas la simplaj senkulpaj *trankvilaj loĝantoj*, kiuj vivas en paco surloke kaj ne interesiĝas pri politiko, sed tamen estas terorigitaj de tiuj modernaj barbaroj, kiuj konas neniujn skrupulojn. Tiuj *plej krue-laj bestoj* ne nur *sin ĵetas kun hakiloj kaj feraj stangoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj*, sed ili disponas pri modernaj efikaj armiloj, kiuj povas detru multajn homojn kaj domojn kaj kiuj eĉ povas pafi kontraŭ civilan aviadilon, kiu flugas en alteco de dek mil metrojn super la milita zono, por faligi ĝin sur la teron, kiel tio okazis en julio, kun centoj da mortviktimoj, pri kiuj neniu volas transpreni la respondecon. Ruslando cinike asertas, ke ĝi ne estas partoprenanto en la ukraina konflikto.

**Kvine:** *Oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi.* La modernaj viktimoj de la 21a jarcento en Ruslando estas la ĉeĉenoj, kartveloj, ukrainoj, osetoj, abĥazoj, krimeaj tataroj, kun miloj da mortintoj aŭ rifuĝintoj. Ĉiuj tiuj kaj aliaj popoloj estas denove kaj daŭre minacataj de la rusaj agresemo kaj ekspansio. Konstruante sian ŝtaton, la ukrainoj *ne deziras altrudi al iu sian regadon*. Ĉiu suverena ŝtato povas mem decidi pri siaj sorto kaj leĝoj. Ankaŭ Ukraino, kiun Ruslando evidente daŭre konsideras kiel siajn terenon kaj influzonon. Kompreneble, kiu volas vivi en Ukrainio, tiu devas respekti la ukrainajn leĝojn (sendepende de tio ĉu ili estas bonaj aŭ ne), kaj kiu tion ne deziras, tiu povas libere forlasi la landon kaj vivi aliloke. La ukrainoj volas kaj havas la rajton pace kaj trankvile vivi en sia propra lando, sen enmiksiĝo de ekstere, kaj en kunlaboro kun la civilizita mondo. Malgraŭ daŭra politika krizo, la ukraina socio fariĝis dum la pasintaj du jardekoj multe pli demokratia kaj moderna ol la ruslanda socio, kiu stagnas en sia evoluo kaj ŝajne deziras eviti ĉian civilizan progreson. La perfida maniero, laŭ kiu Ruslando tradicie traktas la malgrandajn etnojn kaj popolojn en sia influzono kaj en najbaraj respublikoj laŭ la principo „divide et impera“, estas neniel akceptebla, same la misutiligo de la rusa popolo kiel kvina kolono por la subfosaj intrigoj en tiuj etnaj respublikoj (ekzemple en Estonio kaj Latvio), pri la agresema tono en la rusa televido kontraŭ tiuj respublikoj ni tute ne parolu. Do, la rusa registaro faris kaj daŭre faras amason da eraroj, kiuj estas malfacile ripareblaj. Antaŭ ĉio, la rilatoj inter rusoj kaj ukrainoj estas longdaŭre difektitaj. La ukrainoj luktas por la konservado de sia nacia kulturo, al kiu apartenas ankaŭ la ukraina lingvo, kiu ne estas (malgrand)rusa dialekto kaj kiu sub la regado de rusoj kaj sovetianoj preskaŭ elmortis. Antaŭ ol trudi sian dubindan influon al iu ajn, la rusoj devas unue lerni respekti la ekzistorajton de aliaj etnoj, kulturoj kaj lingvoj. Ege mizera estas la kultura kaj lingva situacio de praktike ĉiuj nacimalplimulto en Ruslando, kiu estas la rezulto de longdaŭra rusiga politiko.

**Sese:** *Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas ora da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj.* La nomoj de tiuj homoj en la hodiaŭa Ruslando, kiujn oni povas konsideri kiel abomenindajn krimulojn, kiuj amase dismetas mensogojn kaj kalumniojn kaj arte (farite) kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj, estas bone konataj. Ili sidas en la Kremlo, en la Blanka Domo, en la partio „Unueca Rusio“ kaj en aliaj politikaj pseŭdo-partioj, krome en la parlamento kaj registaro, en



la ministerioj, en la guberniaj, distriktaj kaj urbaj administracioj, kie ili blinde obeas la ordonojn el Moskvo por subpremi la popolon kaj egalŝalti la mediojn en la provinco, sed ili sidas ankaŭ en la ŝtataj entreprenoj, en la sekretaj servoj kaj policorganoj kaj en la armeo kaj nature ankaŭ en la redakcioj de la gazetaro kaj televido, kie ili estas videblaj ĉiutage, kiel ili faras sian naŭze historian propagandon, kiu estas iniciatita kaj stirita de la ruslanda „Gvidanto“ Putin, la moderna caro, kiu ŝajne ne nur adoptis la ideojn de Makiavelo kaj imitas la metodojn de Hitlero kaj Stalino, do reunigante la tradiciojn de komunismo kaj faŝismo, ĵetante siajn venenajn lancojn kaj sagojn kontraŭ siaj elpensitaj malamikoj, kiujn ili trovis en Ukrainio, Ameriko, Eŭropo, en la tuta Okcidento kaj en kelkaj najbaraj ekssovietiaj respublikoj, kiuj apartenas al EU kaj NATO aŭ volas fariĝi ties membroj. Ekzakte kontraŭ tiuj krimuloj la okcidentaj sankcioj estas direktitaj, sed ne kontraŭ la ruslanda popolo en si mem, kiu fariĝis ilia viktimo.

Do, la ĝeneva parolado de Zamenhof de la jaro 1906 koncerne la situacion en Ruslando ŝoke kaj hontinde konservis en principo sian daŭran aktualecon. Zamenhof trafis kaj ĝuste reflektis la situacion jam en sia tempo, ĉar li komprenis, ke la naciaj malplimultoj en Ruslando havas neniujn rajtojn, kio estas la ĉefa kaŭzo de la konfliktoj inter la ŝtato kaj la etnoj. En Ruslando de Putin, kiu, diablo scias, celas restarigi la Ruslandan Imperion aŭ Sovetunion, tiurilate en principo ŝanĝiĝis malmulte. Ruslando, la eterna malhela „Imperio de la malbono“, denove agresas kaj militas kontraŭ aliaj, kiuj havas alian opinion kaj aliajn dezirojn, intencojn kaj planojn ol la regantoj en Moskvo, denove, laŭ malnova rusa tradicio, subpremas kaj persekutas la socion kaj la individuon, se ĝi ne pretas obei la volon de la diktatoro(j) en Moskvo. Kia neimagebla honto por Ruslando! Anstataŭ fariĝi moderna, libereca, demokratia kaj riĉa lando, ĝi reakcie refalis en malnovajn tempojn de la imperiismo, ŝovinismo kaj primitivismo, kiujn jam Zamenhof priploris. Putin, la obskura kaj iom ridinda, sed verŝajne ne malpli senskrapula Nobody el la sovetia KGB, kiu servis al sia patrujo kiel spiono en GDR, mirakle fariĝis nova caro kaj per sia malamo eĉ sukcesis infekti kaj malsanigi grandan parton de la rusa popolo, aŭ nacion, kiu laŭdire fidis kaj adoras tiun prezidenton, kies politikon ĝi ŝajne apogas. Kia nekredebla honto por la popolo, kiu deziras ricevi la respekton kaj agnoskon de la civilizita mondo ! Zamenhof turnus sin en sia tombo, se li sciis ĉion tion.

Kvankam Zamenhof diris en Ĝenevo, ke *oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado (...), ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida*, oni devas konstati, ke en la jaro 2014 tiu rusa popolo plene degeneris kaj komplete perdis sian moralon, ĉar neniu protestas en Ruslando kontraŭ tiu abomeninda putinisma politiko, krom kelkaj kuraĝaj disidentoj, kiujn oni tuj arestas, ĵetas en la malliberejon kaj per tio publike silentigas! Tiel la malnova Ruslando faras al si ĉian honoron !

Ĝis nun la ruslandaj esperantistoj publike silentis pri Putin kaj la situacio en Ruslando, kaj la diskuto kun ruslandaj esperantistoj en la privata korespondado evidentiĝis tre malfacila.

Zamenhof avertis la kongresanojn en Ĝenevo en 1906, ke *pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel privata homo ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multemiliona lando, tamen kiel Esperantistojn tiu ĉi batalado ne povus vin tuŝi, kaj nia kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika, en la dirita lando estas nun farata io, kio nin kiel Esperantistojn*

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

*ne povas ne tuŝi. (...) Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la Esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.*

Do, restas fakte nur voki, en la senco de Zamenhof:

*„Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo. Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam.“*

© [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch), decembro 2014

**Rimarko de la redakcio:** *La artikolo estis verkita en decembro 2014 okaze de la Tago de la homaj rajtoj kaj de la Zamenhof-tago. Ni pensas ke ĝi tamen ne perdis sian aktualecon ankaŭ nun. Koran dankon al la aŭtoro pro lia kontribuo al OKT-2017.*



*Hanso BECKLIN (Usono)*

## LA NOVJUNULO KAJ ESPERANTO

### La hodiaŭa stato

Se oni esploras la aktualajn kondiĉojn, estas sufiĉe facile diri, ke Esperanto kreskas nuntempe. La miliona lernanto jam komencis sian lernadon de la internacia lingvo. Antaŭ nelonge la plurlingva retejo *lernu!* renovigis sian retejon, ne nur fasade sed ankaŭ pedagogie. Miloj da Esperantistoj trovas unu la alian per Amikumu, kaj el multaj milonoj fariĝas milionoj. Sociaj retoj kiel Fejsbuko, Telegramo, kaj Tvitero donas al nia komunumo la eblon komuniki novaĵon kaj klerigon tuj al aliaj Esperanto-uzantoj ie ajn en la mondo.

Malgraŭ tiuj bonaj aŭguroj, la aktiva esperantisto devas sin demandi: kiel kaj kie ni trovos la novan generacion de esperantistoj, kaj kion ili volos fari? Ĉu niaj nunaj organizoj interesos la nunajn novulojn sufiĉe multe, por ke iuj ekstiru ilin kiam la bezono aperos? Sendube, la Interreto posedos ian gravan rolon en la estonteco de tradicia agado, inkluzive de instruado. En tiuj kampoj ni neniam revenos al la praaj epokoj, kiam leteroj liveriĝis monaton post siaj ekspediĝoj kaj eĉ la plej bonaj lokaj kursoj komenciĝis dufoje jare, kaj des pli bone.

Tamen, se ni vetos riskeme pri la magia efiko de la Interreto, ni plej verŝajne trovos nian movadon malpli forta ol nuntempe, ne pli forta—precipe ĉe la nodoj de nia movado, kiuj postulas la plej altan lingvan nivelon kaj intereson. Ni ja en ĉiu epoko bezonas multajn milojn da lernintoj por trovi kelkajn esperantistojn, kiuj estas pretaj aŭ oferi jaron de sia vivo kiel volontulo en Roterdamo, aŭ aktiviĝi en sia landa asocio, aŭ komenci la verkadon de la venonta epokfaranta Esperanta literaturero. Se ion ni lernu de la historioj, ĝi estu tio: “Se Peĉjo ne semos, Petro ne rikoltos.”

Kiel ni semu por rikolti estontece? Ni ĉiuj scias, ke homoj devas aŭdi kaj interesiĝi pri Esperanto por unue trovi kurson, kaj bezonas spronadon por daŭrigi la komencitan

lernadon eĉ por atingi bazan nivelon. Nia lingvo estas relative facile lernebla, sed la interreta epoko kunportas ion ne same konatan antaŭe: pli da distro. Interreta kurso de Esperanto devas konkuri kun la distraĵoj en la alia retumila langeto, kiuj ofte provizas iun per pli da tuja ĝojo ol la multe pli granda (sed posta) ĝojo de lernado. Jes, niaj kursoj kaj lernolibroj devis superi la kinejon kaj la romanon en la pasinteco—sed eĉ la plej granda kinejo ne povis oferti milionojn da filmoj tuje sen kroma kosto, kiel faras Jutubo.

Se ni volas sproni lernantojn kaj lernontojn de Esperanto, ni devos superi la distrojn nuntempajn. Kiel ĝuste tion fari ni povas lerni de la komercistoj, kiuj volas varbi aĉetontojn kaj interesiĝontojn ĉiun tagon. Bonŝance, ili subtenas esploradon pri la emoj de homoj en diversaj landoj. Eĉ pli bonŝance, iliaj trovoj montras al ni, ke surbaze de siaj plej bonaj veraj kvalitoj Esperanto amase trovos bonegan celgrupon: la novjunulojn (angle: *millenials*).

### **Kelkaj gravaj kvalitoj de la novjunulo**

Membroj de ĉi tiu generacio naskiĝis inter 1982 kaj 2004, kaj ili estas sufiĉe malsimilaj kompare kun anoj de antaŭaj generacioj. Novjunuloj sentas sin hejme Interrete, sed ne deziras komunumon nur tie. Pli bone konante la Interreton, ili bone konas ĝiajn mankojn, precipe ĝian izolon. La enketoj montras, ke novjunuloj deziras plaĉan interplektiĝon de siaj interreta kaj interpersona vivoj, traktante la samajn aferojn en ambaŭ medioj, sed malsame.

Unu trajto de ĉi tiu generacio estas, ke ĝiaj anoj amas diversecon kaj scivolos pri homoj malsimilaj al si. Tio havas kaŭzon historian: ili ekkonis la diversecon de la mondo pli frue en siaj vivoj. Novaj teknologioj pli forte ligis homojn, kiuj ne estis similaj—tujmesaĝiloj kaj poŝtelefonoj kreis komunan spacon por ekkoni unu la alian ekster parencaj, religiaj, aŭ sociaj rondoj, estiginte novajn rondojn.

Efektive, tiuj de pli fruaj generacioj plejparte nur *toleris* la diversecon de aliaj homoj, sed eĉ la plej malfermitaj mensoj ne povis sufiĉe rapide konstrui digon por ŝirmi siajn gefilojn kontraŭ la rapida torento de ŝanĝiĝo (kompreneble, en ĉiu generacio esceptoj ekzistas). Tutmonde, novjunuloj pli ofte substrekas la gravecon de libereco kaj homaj rajtoj, eĉ fronte al siaj registaroj. Tion oni povas rimarki en la manifestaciemo de ĉi tiu juna generacio, ŝajne ĉie en la mondo. Sociologoj rimarkas, ke eble ĉi tiu generacio plej similas al tiu, kiu gvidis la famajn manifestaciojn en la 60-aj jaroj. Kelkaj homoj en ĉi tiu generacio eĉ estigis la ĝermon de la nun reganta aperteco, la iam subgrundan kulturon.

Tamen, bona kaj malbona rajdas duope. La pli granda mondo, kiu amigis novjunulojn je diverseco inokulis ilin kontraŭ la friponaĵoj de komercistoj kaj reklamistoj. Komprenante ĉi tion, aktualaj enketintoj konsilas al firmaoj proponi siajn kutimajn varojn kaj servojn kiel *ŝanĝajn spertojn*. Esplorinte bonajn hotelojn, grandajn firmaojn kiel *Apple* kaj eĉ la teatron, ili konstatis, ke homoj pli alte aprezas tion, kio ŝanĝas ilin, eĉ se nur iomete kaj kun mallongdaŭra efiko, per spertoj.

Ekzemple, la bona reputacio de *Apple* devenas de ĝia deziro regi ĉion: la komputilon, la softvaron, kaj eĉ la aĉeton de la komputilo. Tiu metodo multobligas la eblecon, ke iu aparte bona sperto imponas la aĉetinton, kiu per tiu imponiĝo restas fidela al la marko. Eĉ pli grave, tiu deziro regi ĉion helpas firmaon eviti malbonajn spertojn, kiuj pelas ne nur la aĉetinton, sed liajn amikojn for de la firmao.

### Esperanto kaj la novjunulo

Iu, kiu sentas sin komforta kaj en la Interreto kaj parolante en vera rondo de amikoj deziras ion, kio ne postulas disiĝon de tiuj medioj. Esperantistoj ja devas inviti novjunulojn partopreni siajn klubojn, kursojn, kaj kongresojn. Tiuj organizoj donos al ili personan komunumon, kiun ili vere deziras. Samtempe, ni ne miru, se novjunulo neniam taksas ion ne troveblan en sociaj retoj ĉeestinda. Por iu, kiu al-kutimiĝis al la Interreto frue en sia vivo, io grava kaj forta devas ekzisti en ambaŭ medioj, ĉar la novjunulo vivas ambaŭloke. Tial nek tradiciaj organizoj, nek interreta agado povas varbi kaj restigi novjunulojn sen la helpo kaj influo de la alia flanko. Tio signifas, ke ni devas teni niajn kutimajn organizojn viglaj kaj aktivaj, ĉar ili plej bone prizorgas la personan mondon.

La apertaj mensoj de novjunuloj plivastigos la efikecon de nia kuranta agado. Nia historio estas plena de homoj, ofte potencaj, kiuj pro antaŭjuĝoj kaj ŝovinismo ne volis aŭdi pri la ĉefa utileco de Esperanto, ĝia ponteco inter kulturoj. Sed la novjunulo sopiras al ĝuste tio, montrante ĝin per kiel eble plej oftaj vojaĝoj al novaj lokoj (ĉu samurbaj aŭ alikontinentaj) por trempiĝi en diversa kulturo.

Tial, en nia varbado ni devas substreki la fakton, ke Esperanto jam funkcias kiel ponto inter diversaj homoj en nia mondo. Ni emfazu ke Esperanto jam helpis nin plivastigi niajn mondojn kaj ekkoni homojn, kiuj ne parolas la aktualan mondlingvon en iu regiono. Eĉ en la plej grandaj metropoloj, homoj, kaj precipe novjunuloj, kaŝe revas pri pli larĝaj horizontoj.

Tamen, ni antaŭenpuŝu atente. Rakontoj pri personaj ŝanĝaj spertoj multe pli bone konvinkas, ol la (pli racia) ripetado de faktoj kaj statistikoj, kiuj ja bone ilustras la mankon de mondlingvo kaj la tutmondecon de Esperanto. Ni memoru, ke aliaj iloj por mildigi lingvajn barilojn ekzistas kaj estas bone reklamitaj – antaŭ kelkaj tagoj mi spektis reklamon de Guglo, kiu fanfaronis pri nova tujtradukilo poŝtelefona per persona rakonto. Do, ni uzu la saman teknikon. Ni permesu al iu ajn demandi nin pri niaj vojaĝoj kaj spertoj ĉe kongresoj. Fronte novjunulon, pli bona varbilo ne ekzistas.

Finfine, ni devas spertigi la nove varbitan novjunulon, kaj satigi lian soifon je diversaj kulturoj. Rakontoj de aliaj homoj pri mirinda punta lingvo ne daŭrigas studadon kaj intereson senfine. Malkiel *Apple* kaj aliaj grandaj firmaoj, niaj kluboj, kongresoj, kaj renkontiĝoj donas al partoprenantoj bonajn spertojn, kiuj traktas la partoprenanton kiel homon. Tiuj spertoj vere ŝanĝas ilin kaj konvinkas ilin pri la utileco de Esperanto, ofte kreante tutvivan esperantiston.

Tamen, novjunuloj estas forte trafitaj de labormanko aŭ malfacilaj vivkondiĉoj, kaj ne povas elspezi milojn da dolaroj por ĉeesti foran kongreson. Ĉu niaj landaj asocioj povos oferti senpagajn semajnfinojn por novaj lernantoj, same kiel la Esperanto-Asocio de Britio, aŭ grandegajn rabatojn por partopreni kongreson? Se jes, kiel ni distrumpetos tiun eblon? Ni devos uzi pli vastan organaron ol la kutiman por trafi novulojn, aŭ ni nur pluigos la spertadon de konvinkitoj.

Kvankam pluraj homoj havas morman prognozon pri nia movado, mi ne povas imagi pli bonajn kondiĉojn ol la aktualajn. Apenaŭ iu antaŭ cent jaroj vere raviĝis pri diversaj kulturoj, sed la nuna stato estas tute mala. Novjunuloj deziras spertojn, kiuj ŝanĝas ilin – kaj ekde la “Verda Pentekosto” de 1905 la zamenhofa lingvo ofertis ĉi tion al kutimaj

homoj. La Interreto faciligas aktivadon en ĉiu etapo al plena sorbiĝo en la lingvon kaj ĝian movadon. Nun, ek al la laboro, kaj interrete kaj ĉeeste!

**Gravaj fontoj:**


Luttrell, Regina, kaj Karen McGrath. *The Millennial Mindset: Unraveling Fact from Fiction (La novjunula pensmaniero: faktoj kaj fikcioj)*. Lanham, Marilando, Usono: Rowman & Littlefield, 2016.

Pine II, B. Joseph, kaj James H. Gilmore. *The Experience Economy (La ekonomio de spertoj)*. Ĝisdatigita. Bostono, Masaĉusetco, Usono: Harvard Business Review, 2011.

**Noto de la redakcio:** *Ĉi tiu artikolo estis verkita por la ĉi-jaraj NASK – Nord-Amerika Somera Kursaro (de Esperanto), sed estis ankoraŭ nenie publikigita. Ni dankas la aŭtoron pro la kontribuo per ĝi al nia kolokvo.*

**Viktor PAJUK, tradukisto, Ŝikago**

**VASIL MISIK –  
LA UNUA UKRAINA TRADUKISTO  
DE LA ESPERANTO-LITERATURO**



Dank'al miaj E-mentoroj, Nadija Hordijenko-Andrianova kaj Volodimir Pacjurko, dum pli ol 30 jaroj de mia esperantista vivo mi agis sur la limo de la Esperanta kaj ukraina literaturoj. Antaŭ kvar jaroj, en la Tutukrainia scencpraktika konferenco, dediĉita al la 100-jariĝo de „Ukraina Srelo“ tie ĉi, en Kolomeo (2013), mi prelegis pri la unua E-verkisto, ukraino N. Borovko, ankaŭ prezentinte mian ukrainigaĵon de lia fama rakonto “En la tombo”. [1] Samtempe V. Pacjurko menciis pri la unua E-tradukistino de la ukraina literaturo Sofia A. Sviridov(a). [1] Do, finfine oni devas informi pri la unua tradukisto de la originala E-literaturo en la lingvon ukrainan.



**Vasil Misik**

Ĉi jare oni festas 120-jaran datrevenon de la plej eminenta proleta E-poeto [2] Eŭgeno Miĥalskij (1897-1937) kaj 110-jaran datrevenon de unu el la plej famaj ukrainaj tradukistoj el la orientaj kaj okcidentaj literaturoj Vasil Misik (Василь Мисик, 1907-1983). Kio kunligas tiujn du gravulojn de absolute diversaj literaturoj? Ege simpla respondo: V. Misik estas konsiderata la unua ukraina tradukisto de la originala E-literaturo, temas pri la poemo “Lulkanto” [3] kaj ĝia ukraina traduko “Колискова”. [4]

Post la Dua mondmilito pola eldonisto Jerzy Giedroyc (1906-2000) skribis:

*“Mi venis de la lando, kie oni devus  
Sur tombo-ŝtonoj skribi nomojn de vivantoj.  
Por pereintoj de malamikoj  
Mankus tombo-ŝtonoj”.* [esperantigo mia – V.P.]

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

La simila sorto estis destinita al ambaŭ: E. Mihalskij spertis ĝin (li estis mortpafita en 1937), sed V. Misik evitis ĝin, kvankam li trapasis timojn kaj teruraĵojn de Solovecaj insuloj kaj de Sandarmoĥo (Kareljo, RF), kie kapitano de NKVD (*rus.* Popola ministerio de internaj aferoj) Matveev dum tri (!) novembroj tagoj de 1937 pafmortigis eliton de la ukrainaj kulturaj agantoj kaj scienculoj.

Vasil Misik naskiĝis en vilaĝo Novopavlivka (1907) apud Elizavetgrado (nun – Kropivnicko). Li studis okcidentajn kaj orientajn lingvoj en la Ĥarkiva Universitato. Estinte 20-jara li debutis per poemaro “Трави” (1927, *ukr. Herboj*), sekvantaj li aperigis ankoraŭ kvar poemarojn kaj du novelarojn. En 1932 aperis lia matura traduko de kantoj kaj poemoj el verkaro de la eminenta skota poeto Robert Burns. Verdire, Misik ektradukis fine de 20-aj jaroj de XX-a jarcento, lian tradukmanieron forte influis Mikola Zerov kaj nov-klasikuloj. En la ukrainlingva verkaro de Puŝkin (1930, red. Paŭlo Filipoviĉ) de sub la plumo se Misik aperis tradukoj de tri poemoj.

La posta vivo de V. Misik similas al iu preskaŭ neimagebla aventura romano (filmo): en 1934 li estis arestita anstataŭ (!) alia verkisto – Vasil Minko (la lasta forestis hejme, sed NKVD-istoj ne volis reveni sen ne-plenumita ordono). Dum enketado li rifuzis subskribi akuzon, ke “Mi, Vasil Minko (!?), konfirmas, ke mi estas malamiko de la popolo...” Li nur pruvis al juĝesploristoj, ke li NE estas Minko. Post du monatoj oni “proponis” subskribi al li la alian konfeson: “Mi, Vasil Misik, konfirmas, ke mi estas malamiko de la popolo...” Li estis sendita al la Solovecan insularon, kie Misik pasigis 5 jarojn. Antaŭ la Dua mondmilito li revenis al Ĥarkivo: evidentiĝis, ke li perdis ĉion – kaj laboron kaj loĝejon.

Poste okazis la milito, kaptiteco, fuĝo, usonaj militistoj kun propono resti en Okcidento, rifuzo, reveno al Ĥarkivo, laboro kiel librotenisto. Laboro kaj verkado. 1948 – kompilado (sed ne eldono) de la dua verkaro el R. Burns, sed li daŭre restis ekster la literatura proceso.

En la jaro 1957 la kompilisto de la fama diaspora antologio “Mortpafita Renesanco” Jurij Lavrinenko [5] estis surprizita, ekvidinte kelkajn novkreitajn poemojn de V. Misik kun la noto “li partoprenis la militon”. Do, la partio pardonis la Tradukiston. Post du jaroj finfine aperis ukrainigita poemaro de R. Burns (kune kun Mikola Lukaŝ, 1965). Poste aperis liaj ukrainaj tradukoj el John Keats, Rudaki, Ĥajam, Hafizo. Tradukoj de “Robaioj” (Omar Ĥajam) estas brilaj, neripeteblaj, V. Misik tradukis senpere de la malnovaj persa-taĝikaj tekstoj, sen iu ajn subliniaj tradukoj. Li skribis al sia amiko Teren’ Masenko: “*Mi laboras nun super tradukoj el Rudaki, kun la malnova lingvo. Kia forto, kia riĉeco. Rusaj tradukoj estas tradicie kondiĉaj kaj sonas tradicie similaj, eble, pro la kondamnitaj subliniaj tradukoj*” (14an de Decembro 1958). Samnivele li tradukis ĉiujn orientajn klasikulojn.

Vasil Misik forpasis en 1983 en Ĥarkivo, sukcesinte ricevi (1977) tradukistan premion de Maksim Rilskij. Post lia morto verkista asocio de Ĥarkivo proponis eternigi lian nomon per stratnomo, kie li loĝis, sed ĝi ricevis nomon de. Jesenin – evidente, tiutempa Ĥarkovo ne bezonis ukrainiajn nomojn. La kialo estas simpla: Kompartio de Ukrainio sciis, ke V. Misik rifuzis traduki verkaron de la “fratecaj popoloj” (krom la persa-taĝika literaturo).

Sed por ni, ukrainaj (kaj ne nur) esperantistoj, Vasil Misik estis kaj restas la unua ukraina tradukisto de la originala Esperanto-literaturo. Ni ne scias, kiu aŭ kio instigis la tradukiston okupiĝi pri verkaro de Eŭgeno Miĥalskij. Ni povas nur supozi, ke tio okazis ne sen la influo de Serĥij Pilipenko, kiu estris la Societon de vilaĝanaj verkistoj „Plugilo“ (Misik membris en ĝi) kaj la eldonejon „Plugilano“ („Плужанин“), estis esperantisto. Danke al la eldonejo ekvidis lumon la tradukitaj en Esperanton „Fata morgana“ de M. Kocjubinskij, „La ruĝa kaptuko“ de A. Holovko kaj „La morto de Asuar“ de M. Irĉan [6]. Pilipenko kaj Misik loĝis en la sama domo – domo de verkistoj. Pri la kvalito kaj enhavo de la elektita por traduko poemo de Miĥalski ni ĉi tie ne juĝu: ĉio estis konforma al „la socialisma realismo“. Gravas la fakto mem, eble tio estis paŝo al pli vasta perspektivo – konigi al ukrainoj la esperantan literaturon.

Koran dankon al Olga Kerzjuk (la Brita Biblioteko, Londono) pro la senditaj materialoj.

[1] La rolo de la gazeto “Ukraina Stelo”, ĝia redaktoro O. Kuzjma en popularigo de la ukrainaj historio, literaturo kaj kulturo en la mondo kaj de la ideoj de la Internacia Lingvo Esperanto en Galicio (Materialoj de la scienca-praktika konferenco, la 12-13-an de Oktobro 2013, Kolomeo), «Твердиня», Lucko, 2013.

[2] G. Sutton, Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto, 2008, Mondial, New York, p. 68-71.

[3] Miĥalski Eŭgeno, Plena poemaro, FEL, 1994, red. W. Auld.

[4] ж. Авангард, 1929, 3.

[5] Розстріляне відродження: Антологія 1917-1933: Поезія-проза-драма-есеї, Юрій Лавріненко, Париж, 1959.

[6] Pacjurko Volodimir, Granda Esperanta-ukraina vortaro, Lvivo, 2015, <http://ukrainio.org.ua/vortaro/>

*Por la artikolo estis uzitaj interretaj materialoj*

***E. Miĥalskij***

**LULKANTO**

*Dediĉita al infanoj-pioniroj*

Dormu, kara filo, sur la rev-kusen’ de la viv-lulilo en la viv-maten’.	Kuglego eksplodis ĉe l’ domo ĉe l’ muro... Vitroj ekstremis – ekĝemis;
Pasos multaj jaroj ĝis alvenos Bon’; dormu, mia kara, sub kanona son’.	kuras “ eminentaj homoj”, murmuras: “ Venas ili, ruĝaj diabloj...”
Via patro iras liberigi nin; kontraŭ oficiroj luktos li ĝis fin’.	.....
Venos li... Traĥtaĥ...	Dormu, mia kara filo, baldaŭ paĉjo venos; akran sabron kaj pafilon li al vi rimenos;

## 2017 – la jaro de L.Zamenhof

li ĉevalon al vi donos  
junan, belan, fortan;  
kaj fiere vi ĝin spronos –  
miros tuta korto;  
li al ĉapo ruĝan stelon  
kroĉos kvinradian;  
estas vero, ne fabelo!  
Kara filo mia!  
Traĥ-taĥ!

Super nia kabano  
traflugis kuglegoj-par’;  
mian karan infanon  
enlulas pafar’.

Paf-paf-paf, paf-paf-paf –  
sonas tra la stratoj...  
Paf-paf-paf...  
rabas blanksoldatoj.

Tremas la pavim’  
sub la hufofero;  
tremas la anim’  
en angor’-espero.

Ĉu ni venkos aŭ malgajnos,  
ĉu ree nin premos kapital’?  
Sed kio?... Mi aŭdas, aŭ ŝajnas?..  
Internacional’!

“Por finlukto socia  
Ni grupiĝu en rond’  
Kaj la Internacio  
Triumfu en tutmond’!”

Mi rapidas al fenestroj,  
brumalfermas...  
Venkis ni: venis Ruĝa Arme’!  
Kuras for malamikoj,  
timante ekstermon,  
kun la krioj de ve’.

Dormu trankvile, infano –  
jam preterpasis minac’.  
“Pac’ – por kabano.  
Milito – kontraŭ palac’!!!”

Voznesensk, 1923

### *Євген Михальський* КОЛИСКОВА

Оповитий снами,  
Спи, синочку мій,  
В скутій ланцюгами  
Люлі життьовій!

Ще літа пролинуть  
Перед тим добром:  
Спи, мій любий сину,  
Під громи кругом,

Той, кого ми ждали, –  
Прийде батько твій.  
Проти генералів  
стане він на бій.

Прийде він...  
Трах-тах-тах!..

Десь близько упали набої –  
над дахом!  
Вікна стремтіли, запіли, –  
шляхом

тікають “герої”, з жахом шепчуть:  
“підходять червоні чорти”...  
.....

Спи, мій сину, через луки  
таго десь іде вже,  
дасть тобі рушницю в руки  
й шаблю підпереже;  
заірже тобі край тину  
злий і дужий огир;  
всім на диво впнеш ти, сину,  
в бік йому остроги;  
ще й зорю п’ятипромінну



на кашкет наколеш –  
се не казка, – спи, мій сину!  
Спочивай, пахоло!  
Трах-тах-тах!

Через нашу хатину  
там кулі промчало – дві.  
Любу мою дитину  
люблять бої.

Бах-бах-бах, бах-бах-бах!  
Крик. Грабують хати –  
Бах-бах-бах –  
білі йдуть солдати...

Вулиці дріжать,  
коні скаженіють,  
падає душа  
в розпачі-надії.

Чи загинем, чи щастя посміхнеться,  
чи знов запанує капітал? –  
Та що се... вже чути, здається?!?  
Інтернаціонал!

“Чуеш сурми заграли.  
Час розплати настав, –  
В Інтернаціоналі  
Здобудем людських прав!”

Поспішаю до віконниць, одчиняю –  
Перемога, Червона Рать.

Падають, тікаючи з криками одчаю –  
білі біжать, білі біжать.

Спи, безтривожно, дитино,  
зникла загроза страшна.

“Мир – хатинам, –  
проти палаців – війна!..

**Переклав В. Мисик, 1929**

## OSIP MAKOVEJ – 150



Antaŭ unu jaro la esperantista komunumo de Ukrainio dum sia renkontiĝo en Kolomeo – „La tagoj de Oresto Kuzma-2016“ – celebris du jubileojn – la 160-an datrevenon de la naskiĝo de Ivan Franko kaj 150-an de la naskiĝo de Miĥajlo Hruŝevskij. Kaj jen ĉi-jare ni festas vican jubileon: antaŭ 150 jaroj venis en la mondon Osip Makovej’ (ukr. Осип Маковей) – talenta ukraina poeto, prozisto, publicisto, literaturkritikisto kaj pedagogo. Ivan Franko enkondukis lin en la grandan literaturon, publikiginte la unuajn poeziaĵojn kaj tradukojn de la gimnaziano Osip. Kun Franko kaj Hruŝevskij Makovej havis la honoron kunredakti „La literatursciencan revuon“ (ukr. „Літературно-науковий вістник“).

La jubileulo ne atingis tiajn glorpintojn kiel liaj grandaj samtempuloj pro diversaj vivmalfacilaĵoj. Li mem konsideris sin ordinara literaturkonstuanto: „Se mi ion verkas, mi faras tion nur pro konvinko, ke tia konstruaĵo kiel literaturo bezonas ne nur sagacajn inĝenierojn, sed ankaŭ la brikportantojn, el kiuj la unua estas mi!“

Osip Makovej naskiĝis la 23-an de aŭgusto 1867 en la urbo Jávoriv (Lviva provinco) en la familio de peltisto. Lernis en la loka elementa lernejo kaj en Lviva gimnazio. Kiel gimnaziano devis perlabori por si panon per privataj lecionoj. Studis en la filozofia fakultato de Lviva universitato, doktoriĝis en Ĉernivca universitato. Laboris kiel



**Osip Makovej en la rondo de ukrainaj verkistoj.** Sidas de maldekstre dekstren: **Miĥajlo Pavlik, Jevhenija Jaroŝinska, Natalija Kobrinska, Olĥa Kobilanska, Silvestr Lepkij, Andrij Ĉajkovskij, Kostj Pankivskij (pli aĝa).** Staras en la dua vico: **Ivan Kopaĉ, Volodimir Hnatjuk, Osip Makovej, Miĥajlo Hruŝevskij, Ivan Franko, Oleksandr Kolesa, Bohdan Lepkij.** Staras en la tria vico: **Ivan Petruŝeviĉ, Filaret Kolesa, Josip Kiŝakeviĉ, Ivan Truŝ, Denis Lukijanoviĉ, Mikola Ivsjuk.**

ĵurnalisto, pedagogo. Estis direktoro de la instruista seminario en Zaliŝĉiko (Ternopila provinco). Mortis la 21-an de aŭgusto 1925 en Zaliŝĉiko, kie estis entombigita.

La krea heredaĵo de Osip Makovej estas riĉa kaj diversa laŭ ĝenroj. Li verkis ĉirkaŭ 300 poeziaĵojn, tradukadis el diversaj literaturoj (pola, germana, franca, angla k. a.), sed pleje famiĝis per sia prozista talento. Li aŭtoris multajn rakontojn, ofte malavare spicitaj per humuro kaj satiro. Interesa estas lia historia novelo „Jaroŝenko“, kiu priskribas la eventojn de la Ĥotina milito 1620-1621 (inter poloj kaj turkoj, kiun partoprenis ankaŭ ukrainaj kozakoj).

La temojn por siaj rakontoj kaj humuraĵoj Makovej prenis el la reala popola vivo; pri la malriĉa gimnaziano Mikola Demidiv, kiu serĉas sian vojon en la vivo („Printempaj ŝtormoj“), aŭ pri la huculo Jurij Bodnarjuk („Ekster la leĝo“), kiu por sia ruiniĝanta kabaneto hakis piceeton kaj pro tio estis monpunita (la monpuno pro nepago kreskis kaj ekzekutistoj decidis aŭkcie vendi la kabanon), aŭ pri ukrainaj pseŭdopatriotoj kaj politikistoj („Kiel Ŝevĉenko serĉadis laboron“, „KVB“), aŭ militaj motivoj („Limo“, „Invalido“, „En tranĉeoj“, „Sanga kampo“).

Kelkaj poemoj kaj prozaĵoj de la verkisto estas tradukitaj en Esperanto. Ankoraŭ dum lia vivo Oresto Kuzma tradukis la humuraĵon „Muŝkaptulo“, kiu estis publikigita en la prestiĝa „Literatura mondo“ (N<sup>o</sup> 1/1925). La saman humuraĵon, sed 60 jarojn poste, tradukis Denteto (pseŭdonimo de ivanofrankivska esperantisto Jurij Zubik), ce-

rte ne sciante, ke ĝi jam estas tradukita. Al lia plumo apartenas ankaŭ tradukoj de du poeziaĵoj. Pri tradukado el Makovej okupiĝis ankaŭ Volodimir Pacjurko. Li tradukis tri verkojn: „Ŝtonepoko“, „En la juĝo“ kaj „KVB“.

## LA VERKOJ DE OSIP MAKOVEJ, TRADUKITAJ EN ESPERANTON

### ELEGIO

(Елегія)

Post morto reviviĝos ni plurfoje	Sed iam junulino sola venos
En rememoroj, en surtomba krin’,	Dormeman boskon, mildan sub sunvarm’,
Ĝis kiam apud ni en tomb’ malĝoja	Subite koro pro malĝoj’ eksvenos,
Ekdormos ĉiuj, memorintaj nin.	Morniĝos hela mond’ pro ŝia larm’.

Kaj estos tio nia lasta morto,	Ĉar nin ŝi vidos kaj ekaŭdos meze,
Disblovos vento polvon tra la mond’.	Kvazaŭ fabelon de la praa jar’;
Printempo venos, vekos la amforton –	L’ okulojn fermos kaj suspiros peze,
Neniu rememoros nin en rond’.	Ĝuante dormkvieton de l’ arbar’.

1898

*Elukrainigis Denteto.*

\* \* \*

### (Помер рекрут в непривітній столиці...)

Rekruto mortis en ĉefurbo morna,	Orkestro al rigida li;
De sia vilaĝet’ en malproksim’.	En ĉerko, kie la rekruto dormas,
Ĉe li forestis en la lasta horo	Ja ne aŭdeblas melodi’.
Patrin’-vidvino, amatin’.	Sonoras sonoriloj kun saluto –
Mortante, ne ekvidis la soldato	Invitas al ripoz’ en tomb’ rekruton.
Eĉ unu larmon, signon de l’ kompatato.	Kaj en vilaĝ’ en tiu ĉi momento
Kaj veturigas lin jam nigra ĉaro,	Leteron skribas la patrin’:
La pastran preĝon portas vent’,	“Pro kio vi silentas? Pro ofendo?
Funebra marŝon ludas trumpetaro,	Aŭ kara fil’ forgesis min?
Soldatoj paŝas en silent’.	Saluton via amatino sendas...
Sed mankas en funebra procesio	Mi al Kristnasko hejmen vin atendas...”
Nur amatino kaj patrino lia.	1894

Rekruto mortis, kaj malĝoje ŝtormas

*Tradukis Denteto*

### ŜTONEPOKO

(Кам’яна епоха)

Traleĝinte saĝan libron	Ĵetis predon ĉe l’ kaverno
Pri la ŝtonepoka viv’,	Li kaj diras al edzin’:
Vidas mi: prapatro trenas	„Prenu tiun ĉi bestaĉon,
Sin en virgarbar-masiv’.	Per rostaj’ manĝigu min!“

Li cervidon hejmen portas,	„Mi hodiaŭ la rostaĵon, –
De l’ vizaĝ’ fluegas ŝvit’.	Diras kulpe prapatrin’ –
Kvankam suno jam subiras,	Ne preparis. Tamen bonas
Ardas, kiel en zenit’.	Ŝinko kruda. Provu ĝin!“

## jubileoj

La prapatro ekkoleris:  
„Kial do vi, aĉulin’,  
Ĝin ne rostis?! For, kanajlo,  
Ĉar mi tuj mortigos vin!

Mi vagaĉas tra l’ arbaroj,  
Vane pasas mia viv’  
Kaj kompanse krudan ŝinkon  
Nun al mi proponas al vi?!“

Tremas prapatrin’ pro timo:  
„Estingiĝis fajroflam’.  
Longe frotis mi bastonojn,  
Ne ekbrulis ili jam“.

Kaptis vir’ siliktranĉilon:  
„For de l’ vido, oldulin’!“

Tranĉis de l’ cervido pecon  
Kaj la krudan manĝas li.

Kun la manoj surokule  
Ploras ino pro malgaj’:  
„Bone diri pri l’ rostaĵo,  
Sed ne ĉiam estas fajr’“.

Ho, ne ploru, prapatrino,  
Ĝi ne estas dume plag’!  
Instruiĝu fari fajron –  
Kaj sukcesos via ag’!

Plagon spertos viaj idoj  
En elektrepoko, ĉar  
Fajr’ abundos, sed rostaĵo  
Unufojos en la jar’!

*Tradukis Volodimir PACJURKO*

**Noto de la redakcio:** *Sube estas paralele prezentitaj la du tradukoj de la rakonto de Osip Makovej faritaj de Orest Kuzjma kaj Denteto, kiujn vi povas kompari.*

## MUŜKAPTULO (Мушкaпyлo)

Apud la vilaĝo K., ĉe la rivero Dniestro, aperis viro de neniu konata, tiom nesingardema aŭ senzorga kontraŭ ĉiuj ordonoj de la registaro, ke li ne anoncis sin ĉe la policejo, li nur vagadis libere, kiel en la malnovaj bonaj tempoj. La unuan sciigon pri li alportis Paranjo, servistino de la registara polica postenestro, sinjoro Lupo; ŝi, unue al sinjorino Lupo, kaj poste ankaŭ al Lupo mem, prirakontis la renkonton.

– Iras mi – ŝi diras – apud la arbaro, kaj jen, tie ia sinjoro, grizbarba, kun okulvitroj, ĵetas sakon super kardojn kaj kaptas muŝojn aŭ ion sinilan. Mi halltas malantaŭ arbeto kaj rigardas kion li faros plu. Kaj li sidiĝas tere kaj komencas grati, fosi, ion li elprenas, ion li kaŝas... Ŝajnas, ke homo cerbe ne kompleta. Mi ĉirkaŭiris lin de malproksime; prefere estas ne renkontiĝi kun tia muŝkaptulo.

La raporto de Paranjo ne estis kompleta. Sinjoro Lupo volis ankaŭ scii, kion tiu nekonato kaŝadis aŭ fosis, al kiu li signalis per tiu flago aŭ sako, ĉu iu povis tion percepti, – Paranjo ektimiĝis pro tiuj esploroj, sed ŝi povis nenion plu diri. La postenestro, zorga pri la paco de la ĉirkaŭaĵo konfidita al lia gardo, tuj alvokis sian policiston, Franciskon Borilo, kaj ordonis al li tuj trovi la muŝkaptulon kaj konduki lin al la policejo.

Dum tio okazis, laŭ la Dniestra bordo, super la akvo, iris soldato de limimposta bataliono, Vojtek Rapo, kies devo estis gardi ke iu el Bukovino ne kontrabandu trans la Dniestron brandon en Orientan Malgrandpolujon. Jen, tiu Vojtek ekvidis sur Dniestra ↴



## MUŜKAPTULO (Мухолап)

En la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo K. apud Dnistro aperis konata por neniu homo, tiom nesingarda aŭ indifera al ĉiuj ordonoj de la aŭtoritatoj, ke li mem ne prezentis sin en policejo, sed nur iradis libere, kiel dum la malnovaj bonaj tempoj. La unuan sciigon pri li alportis Parano, servistino de la komandanto de la ŝtata policejo sinjoro Lupo. Ŝi komence rakontis al sinjorino Lupo kaj poste al la komandanto Lupo mem pri sia renkonto.

– Iras mi laŭlonge de la arbarrando, – diras ŝi, – kaj vidas: jen tie iu sinjoro kun la griza barbo kaj okulvitroj jetadas sakon super herbaĉoj, – kaj kaptas muŝojn aŭ ion similan. Mi kaŝiĝis malantaŭ arbusteton kaj rigardas, kion li faros plu. Li sidiĝas teren kaj komencas skrapi, fosi, ion elmetas, ion kaŝas... La homo ŝajnas frenezeta. Mi preteriris lin de malproksime: pli bone estas ne renkonti tian muŝkaptulon.

La raporto de Parano ne estis kompleta. Sinjoro Lupo volis ankoraŭ scii, kion la nekonato enfosis aŭ elfosis, al kiu li signalis per tiu flago aŭ sako, ĉu iu povis vidi tion, – Parano eĉ ektimis pro tiu pridemandado, sed nenion pli ŝi povis rakonti. La komandanto, zorganta pri la paco de la regiono, kiun oni konfidis al lia prizorgo, alvokis sian policiston Francisko Borilo kaj ordonis al li senprokraste trovi la muŝokaptanton kaj venigii lin al la policejo.

Ĝis kiam tio okazis, laŭ la bordo de Dnistro apud akvo iradis la soldato de la dogana bataliono Vojtek Rapo, kiu devis gardi landlimon, por ke iu el Bukovino ne kontrabandu trans Dnistro brandon en Orientan Malgrandpolujon. Do tiu Vojtek ekvidis sur la ↴

## jubileoj

roko mirindan strangajon: griza sinjoro, kun okulvitroj, svingis blankan saketon sur bastoneto – kaj ĝuste en la direkto de Bukovino: unuan, duan fojon, trian fojon, poste li enrigardis la sakon, tiris el la poŝo botelon, sidiĝis tere – kaj ne sciante kion li faris plu, ĉar de malproksime tio ne estis videbla. Vojtek Rapo komprenis sian servon kaj kvankam li tre malvolis rampi la krutan flankon de la bordo, la devo ordonis al li observi de proksime tiun suspektan sinjorulon. Nenia dubo: tiu svingado per flagego en la direkto de Bukovino estis plensignifa, – li donis signalon al kontrabandistoj alibordaj, ke ili eklaboru je la tria punkto.

La muŝkaptulo sidis sur ŝtono kaj venenis per alkoholo ian papilion, kiam Rapo haltis apud li kaj diris minace:

- Kion vi faras ĉi tie?
- Ĉu vi ne vidas? – respondis la muŝkaptulo.
- Jen rumana brando, kiu staras apud vi?
- Mi ne scias. Provu!

Rapo levis la botelon kontraŭ la sunon, ektrinkis abunde kaj ŝmacis.

- De kie vi havas tiun brandon?
- Mi aĉetis.

La muŝkaptulo trankvile kaŝis la papilion en la skatolon kaj rigardis la soldaton iom mirante, iom scivole.

- Kiu vi estas? – demandis plu la soldato.
- Profesoro de la krakova universitato.
- Diru tion al iu pli malsaĝa, ne al mi!
- Bone, se mi trovos tian, mi diros.

Rapo ne rapidis respondi, sed demandis plu:

- Kial vi svingis trifoje per la flago en la direkto de Rumanujo?
- Ĉar tio estis necesa.
- Nu, do mi arestas vin.

La muŝkaptulo ne kontraŭstaris.

En la sama momento, kvazaŭ vokita, venis rapide policano Borilo. Rapo rakontis al li ĉion kion li vidis, – kaj ambaŭ tre ĝojis kapti tian necertan gaston.

Rapo restis apud Dniestro, kaj Borilo ne longan faris ceremonion kun la nekonato, nur ordonis al li iri antaŭen.

– Rapidu, rapide, ĉar multan tempon mi ne havas. Mi jam sufiĉe kuradis pro vi kiel hundo.

- Ĉu mi petis vin pri tio? – defendis sin la muŝkaptulo.
- Ne ŝercu kun mi, – respondis la policano severe, – ĉar ŝercojn mi ne komprenas. Muŝkaptulo eksilentis.

En la policeja korto iradis Paranojo. Kiam ŝi ekvidis la muŝkaptulon, tuj ŝi ekkuris al sinjorino Lupo:

- Iras, iras la sama, kiun mi vidis apud la arbaro.

Sinjorino Lupo elkuris balkonon<sup>1</sup>, por ekrigardi la mirindaĵon. En vilaĝo vivi estas tre enue, tial ĉiu novaĵo interesis ŝin.

<sup>1</sup> Tiel estas en la gazeto, devus esti: peronon



krutaĵo apud Dnistro strangan mirindaĵon: iu grizhara sinjoro kun okulvitroj svingis per blanka saketo sur vergo – kaj direkte al Bukovino – unufoje, duafoje, triafoje, poste li enrigardis sakon, elpoŝigis boteleton, sidiĝis teren – sed kion li faris plu, Vojtek ne sciis, ĉar de sube li ne estis videbla. Vojtek Rapo komprenis sian servon, kaj kvankam li ege ne volis grimpi sur la krutan bordon, la devo ordonis al li atente fiksrigardi la suspek-tindan sinjoraĉon de proksime. Sendube: tiu svingado per flageto direkte al Bukovino havis sian signifon – li signalis al kontrabandistoj sur la kontraŭa bordo, ke ili je la tria post la noktomezo komencu laboron.

La muŝkaptulo sidis sur ŝtono kaj estis venenmortiganta per alkoholo ian papilion, kiam Rapo aperis antaŭ li kaj diris minace:

- Kion vi faras ĉi tie?
- Ĉu vi ne vidas? – respondis la muŝokaptanto.
- Ĉu la brando, staranta ĉe vi, estas rumana?
- Mi ne scias. Gustumu.

Rapo levis botelon kontraŭ la suno, ektrinkis el ĝi per longa tiro kaj ŝmacis.

- De kie vi havas tiun brandon?
- Mi aĉetis.

La muŝkaptulo trankvile kaŝis la papilion en skatoleton kaj fiksis la okulojn sur la soldato iomete mire, iomete kun intereso.

- Kiu vi estas? – daŭrigis demandi la soldato.
- Profesoro de la Krakova universitato.
- Diru tion al iu pli stulta, sed ne al mi.
- Se mi trovos tian, do diros.

Rapo ne kaptis la sencon de la respondo kaj demandis plu:

- Por kio vi svingis trifoje per la flageto direkte al Rumanujo?
- Ĉar estis necese.
- Nu, do mi vin arestas.

La muŝkaptulo ne rezistis.

Ĉi-momente, kvazaŭ vokita, alvenis rapide la policisto Borilo. Rapo rakontis al li pri ĉio, kion li vidis, kaj ambaŭ tre ĝojis, ĉar kaptis tian nefideblan gaston.

Rapo restis apud Dnistro, kaj Borilo ne faris longajn ceremoniojn kun la nekonato, nur ordonis al li iri antaŭ si.

– Pli rapide, pli rapide, ĉar mi ne havas tempon. Mi jam sufiĉe postkuradis vin, kiel hundo.

- Ĉu mi vin petis? – defendis sin la muŝokaptanto.
- Ne ŝercu kun mi, – respondis la policisto severe, – ĉar mi ŝercojn ne konas.

La muŝkaptulo silentiĝis.

Sur la korto de la policejo iradis Paranjo. Ekvidinte la muŝkaptulon, ŝi tuj kuris al sinjorino Lupo:

- Venas, venas la sama, kiun mi vidis apud la arbaro.

Sinjorino Lupo elkuris sur la peronon rigardi lin, kiel mirindaĵon. En la vilaĝo estis terura enuo, tial ajna novaĵo interesis ŝin.



## **jubileoj**

Venis la muŝkaptulo, lin sekvis la policano, ambaŭ ŝvitantaj, ĉar ardis varmego. Sinjorino Lupo haltigis la policanon.

– La edzo dormas post tagmanĝo, atendu! Iru al kuirejo tagmanĝi! Tiu sinjoro ja ne forkuros.

– Li nur provu, mi lin atingos per kugleto – ekminacis Borilo, kisis apetite al la sinjorino la manon, ekridetis, palpebrumis al ŝi kaj foriris al la kuirejo.

Sinjorino Lupo sekvis lin, sed post momento denove li<sup>2</sup> revenis en la balkonon, ĉar ŝin tre logis la babilado kun la muŝkaptulo. Tiu sidis sur benko, viŝadis sian tutan kapon per poŝtuko, poste purigis la okulvitrojn kaj spiris profunde, – videble li laciĝis. Li aspektis tre malfeliĉe: ordinare vestita por vojaĝo, polvita, kun poŝego surŝultre, lada skatolo fronte kaj dua poŝego maldekstre; – bastono kaj reto por insektoj staris apogite al la muro.

Sinjorino Lupo komencis interparolon:

– Vi venis ĉi tien el Krakovo?

– Jes.

– Por kio?

– O, sciu, tie ĉi ĉe vi estas belegaj „flora“ kaj „faŭna“ – kaj ĝin mi volis vidi.

Sinjorino Lupo ekmiris:

– Belega Flora kaj Faŭna – ĉi tie ĉe ni? Mi ne aŭdis pri ili. Ĉu ili logas tie ĉi?

La muŝkaptulo ekrigardis sinjorinon Lupo kaj respondis trankvile:

– Tio estas neniaj homoj, nur la tuta mondo planta kaj besta. Vi havas tie ĉi en viaj Dniestraj valoj mirindajn maloftajn plantojn, papiliojn, lacertojn, serpenton de Eskulapo... Jen, se iu trovus por mi tiuspecan serpenton, mi bone pagus, Verŝajne ili estas jam maloftaj ti<sup>3</sup> ĉi.

– Kaj ĉu apud Krakovo ili mankas? – diris sinjorino Lupo. – Mi ja lernis, ke sub la Vavelo en kaverno estas eĉ terura drako.

– Estis iam, – respondis la muŝkaptulo, – nun ĝiaj posteuloj disrampis ĉe la limoj kaj atakas la trankvilajn homojn.

Sinjorino Lupo ekmemoris la vortojn de Paranjio, ke al tiu ĉi muŝkaptulo io mankas spirite – kaj ŝi malantaŭpaŝis al la pordo por, ĉiuokaze, povi sin rapide kaŝi. Sed kiel edzino de policisto, ŝi opiniis sia devo gardi lin, ĝis Borilo jam tagmanĝis kaj la edzo estos sufiĉe dorminta.

La muŝkaptulo elpoŝigis ian manĝaĵon kaj ekmanĝis. Dume al la ĉambro eksonis tondra voĉo de postenestro Lupo:

– Karonjo! – Jen li vokis la edzinon.

Karonjo enkuris la ĉambron, restis tie momenton, poste vokis Borilon el la kuirejo kaj ambaŭ invitis la muŝkaptulon en la kontoron, kune kun ĉiuj liaj sakoj kaj instrumentoj. Komenciĝis esplorado, kiun krom Borilo ĉeestis ankaŭ Karonjo, ĉar en vilaĝo enue estas vivi, kaj jen okazas novaĵo.

– Legimitaĵo<sup>4</sup>! Nepre! – tonbris tuj ĉe la eniro la grasa Lupo.

La muŝkaptulo prezentis ĝin kaj modeste atendis apud la pordo, – neniu petis lin ke

<sup>2</sup> Tiel estas en la gazeto, devas esti: ŝi.

<sup>3</sup> Tiel estas en la gazeto: devas esti: tie.

<sup>4</sup> Tiel estas en la gazeto, devas esti: legitimaĵo.





Alvenis la muŝkaptulo kaj la policisto post li, ambaŭ preskaŭ rostitaj, ĉar estis varmeĝo. Sinjorino Lupo haltigis la policiston:

– La edzo dormas post la tagmanĝo, atendu! Iru al la kuirejo kaj tagmanĝu! Tiu sinjoro certe ne fuĝos.

– Li provu, mi tuj lin per kugleto atingos, – minacis Borilo, kisis agrable ŝian manon, ridetis, palpebrumis al ŝi kaj eniris la kuirejon.

Sinjorino Lupo iris post li, sed post unu momento revenis sur la peronon, ĉar ŝi havis grandan deziron babilu kun la muŝkaptulo. Li sidis sur la benketo, viŝadis la tutan kapon per la poŝtuko, poste purigis la okulvitrojn kaj malfacile spiradis – videblis, ke li laciĝis. Aspektis li tre mizere: vestita kutime kiel por vojaĝo, polvokovrita, kun sako surdorse, kun ladskatolo antaŭe kaj kun alia sako flanke – bastono kaj insektokaptilo staris apogitaj ĉe la muro.

Sinjorino Lupo komencis interparolon:

– Ĉu vi venis ĉi tien el Krakovo?

– Jes.

– Por kio?

– Ho, vi scias, ĉi tie ĉe vi estas belega flaŭro kaj faŭno – kaj mi volis mem ilin vidi.

– Belega Flaŭro kaj Faŭno, – ĉi tie, ĉe ni? Mi pri ili ne aŭdis. Ĉu ili ĉi tie loĝas?

La muŝkaptulo fiksas mire la okulojn sur la sinjorino kaj respondis trankvile:

– Ili ne estas homoj, sed la tuta aro kreskaĵa kaj animala. Vi havas ĉi tie en la ĉednistraj ravinoj mirindegajn rarajn kreskaĵojn, papiliojn, lacertojn, kolubrojn de Eskulapo... Jen, se iu kaptus al mi unu tian kolubron, mi bone pagus. Verŝajne, malmulte da ili jam restis ĉi tie.

– Kaj ĉu apud Krakovo ili forestas? – miris sinjorino Lupo, – mi ja lernis, ke apud Vavelo en kaverno estas eĉ terura drako.

– Estis iam, – respondis la muŝkaptulo, – nun liaj idoj disrampis en limregionoj kaj atakas senkulpajn homojn.

Al sinjorino Lupo venis en la kapon vortoj de Parano, ke tiu muŝkaptulo estas frenezeta, kaj ŝi reiris al la pordo por ĉiukaze povi rapide sin kaŝi. Sed, kiel la edzino de la policisto, ŝi opiniis, ke ŝia devo estas gardi lin tiel longe, ĝis kiam Borilo finmanĝos, aŭ la edzo findormos.

La muŝkaptulo elpoŝigis ian manĝaĵon kaj komencis manĝi. Samtempe el la ĉambro ektondris laŭta voĉo de la komandanto Lupo:

– Karolinjo! – tiel li vokis la edzinon.

Karolinjo enkuris la ĉambron, restis tie momenton, poste alvokis Borilon el la kuirejo kaj ambaŭ invitis la muŝkaptulon en la kancelaron kune kun ĉiuj liaj sakoj kaj iloj.

Komenciĝis enketado, ĉe kiu, krom Borilo, estis ankaŭ Karolinjo, ĉar en la vilaĝo estas enua vivo, kaj nun okazis novaĵo.

– Legitimaĵon! Absolute! – ekkriis tuj post la eniro la dika Lupo.

La muŝkaptulo donis kaj atendis modeste apud la pordo – neniu invitis lin sidiĝi. ↴

## jubileoj

li sidigu. Lupo rigardis la legitimaĵon kaj la muŝkaptulon, observis la sigelojn, meditis – kaj fine decidis:

– Ĝi povas esti vera legitimaĵo, nepre! sed ĝi povas esti ankaŭ falsita. Ni konas tiajn ruzaĵojn. Tie ĉi vagas en la ĉirkaŭaĵo diversaj bolŝevikoj kaj ukrainoj – kaj ĉiu havas legitimaĵon kun sigeloj. Kaj mi respondas pri la ordo – nepre! Kial vi ne anoncis vin en la starostejo kaj en la distrikta polica komandejo kaj ĉe mi?

– Ĉar al mi ne estis dumvoje.

– Ne dum-vo-je – ripetis moke Lupo. – Borilo, faru revizion!

Borilo prenis de la profesoro la grandan ladan skatolon kaj kun eksvingo li elŝutis el ĝi sur la liton de Lupo ĉion kion ĝi enhavis. Tie estis tri orbrilaj lacertoj kun bluetaj kapoj, unu serpento kaj du angvisoj. La lacertoj tuj forkuris de la lito sur la plankon kaj la serpento, kun la agvisoj, disramis tra la lito serĉante vojon sur la teron.

– Helpon! – ekkriis sinjorino Karonjo kaj ĵetis sin al la pordo. Sinjoro Lupo ankaŭ forsaltis de la lito, kaj Borilo estis la unua en la vestiblo. Pro la krio alkuris ankaŭ Paranjeo kaj kune kun la sinjorino ŝi faris tian tumulton kvazaŭ io terura estus okazinta.

– Serpentoj, viperoj en la domo! Ho, kie nun ni dormos?

– Ne timu! – trankvikiĝis ilin la profesoro, – ili estas tre senkulpaj kreitaĵoj. Ĉu permesite al mi repreni ilin?

– Prenu al la diablo tiun viperaĵon! Nepre! – ekkriis kolere sinjoro Lupo. – Ankoraŭ tio mankas en mia hejmo! Kial vi nen diris kion vi havas en la skatolo?

– Nu, se revizio do revizio! Vi min ne demandis – defendis sin la profesoro kaj kaŝis denove ambaŭ angvisojn en la skatolo.

Dume la serpento kaj ambaŭ lacertoj subrampis la liton de sinjoro Lupo. La profesoro kuŝiĝis sur la planko, enrigardis sub la liton, petis doni bastonon, serĉis per ĝi la forkurintojn – nenio helpis. Poste li mem la liton formetis de la muro, – nenio estis tie.

– Ili aŭ enrampis tiujn ĉi truojn apud la muro, aŭ estas en la lito, – klarigis li la aventuron tute trankvile, – domaĝe pri tiu serpento, belega ekzemplero ĝi estis.

Dume ankaŭ sinjoro Lupo lamentis: „Kie mi dormos?!“ Kaj lia edzino kaj Paranjeo kuris en la korton, ĉiam rigardante sub la piedojn, ĉu ne postrampas ilin la „viperaĵo“.

– Mi diris al la sinjorino moŝto – parolis Paranjeo – ke li estas necerta homo. Por kio taŭgas al li tiuj viperoj? Kaj li ne timas! Prenas ilin en la manon! Sorĉisto!

Sinjoro Lupo grandanime rezignis pri la plua revizio koncerne la muŝkaptulon, ĉar nun pli gravis la revizio de la propra lito, li eliris en la korton kaj ordonis:

– Borilo! Ĉi tie en la vilaĝo estas judo Holder, kiu alveturis por bovidoj. Trovu lin nepre kaj sur lia veturilo vi, kun tiu ĉi sinjoro, veturos en la urbon. Tie transdonu lin al la sinjoro komisario, ke li faru plu kion li mem volas! Nepre! Kial mi sekigu mian kapon? Sed estu singardema, ĉar eble li estas efektiva profesoro, tiam li povus havigi al ni malagrablaĵojn. Komprenite?

La alurba vojaĝo sur veturilo kun bovidoj ne estis tiom malagrabla kiom supozis la muŝkaptulo, ĉar intertempe li sukcesis instrui Borilon, ke la apudniestra regiono per sia „faŭno“ kaj „floro“ similas la nigramaran kaj tiun de la maro Mezotera. Ĉi tie troviĝas papilio *Saturnia Pyri*, ĉi tie estas floro *Cypripedium calceolus*, *Pulsatilla pratensis*, *Amygdallus*, *Iris aphylla* samspeca kiel en Sicilio, *Adonis*, akacioj, fama *Ephedra*



Lupo rigardis la legitimaĵon kaj muŝkaptulon, pririgardis sigelojn, profundigis en pensadon kaj finfine decidis: “Tio povas esti vera legitimaĵo, absolute, sed povas esti ankaŭ la falsa. Ni konas tiajn trukojn. Ĉi tie en la ĉirkaŭaĵo vagabondas diversaj bolŝevikoj kaj ukrainoj – kaj ĉiu havas ian legitimaĵon kun sigeloj. Sed mi mem respondecas pri paco – absolute!”

– Kial vi ne prezentis vin al la distrikta estraro, kaj al la distrikta polickomando, kaj al mi?

– Ĉar tio estis al mi ne samvoje.

– Ne sam-vo-je, – ripetis Lupo kun moko, – Borilo, faru traserĉon!

Borilo prenis de la profesoro grandan ladskatolon kaj svinge elŝutis el ĝi enhavon sur la liton de Lupo. Tie estis tri orbrilaj lacertoj kun bluetaj kapetoj, unu kolubro kaj du angvisoj. La lacertoj tuj saltis de sur la lito planken, sed la kolubro kaj la angvisoj disrampis sur la lito, serĉante vojon al tero.

– Helpon! – ekkriis sinjorino Karolinjo kaj forkuris al la pordo. Lupo ankaŭ forsaltis de la lito, kaj Borilo la unua atingis la vestiblon. Aŭdinte krimon, alkuris Paranjo kaj faris kun la sinjorino tumulton, kvazaŭ okazis io eksterordinara.

– Kolubroj, vipuroj en la domo! Kie do ni dormos?

– Ne timu! – trankviligis ilin la profesoro. – Tio estas tre sendanĝeraj estaĵoj. Ĉu mi povas ilin repreni?

– Prenu do al diablo tiun serpentaĉaron! Absolute! – ekkriis kolere sinjoro Lupo. – Al mi nur tio mankas hejme! Kial vi ne antaŭdiris, kion vi havas en la skatolo?!

– Nu, se traserĉo, do estu traserĉo! Vi min ne demandis, – defendis sin la profesoro kaj rekaŝis la ambaŭ angvisojn en la skatolon.

La kolubro kaj la lacertoj dume kaŝis sin sub la lito de sinjoro Lupo. La profesoro kuŝiĝis planken, rigardis sub la lito, petis doni al li bastonon, serĉis per ĝi la fuĝintojn – sed nenio helpis. Poste li mem deŝovis la liton de la muro – vane, ili forestis.

– Aŭ ili enŝoviĝis truojn ĉe la muro, aŭ estas en la lito, – klarigis li aventuron trankvile. – Bedaŭras mi pri la kolubro, ĝi estas belega ekzemplero.

Samtempe ankaŭ sinjoro Lupo plendis: “Kie do mi dormos?!” Lia edzino, Paranjo kaj Borilo elkuris la korton kaj ofte rigardis sub la piedojn, ĉu ne rampas post ili “serpentaĉaro”.

– Mi diris, sinjorino, – parolis Paranjo, – ke li estas ia suspektinda homo. Por kio li bezonas tiujn vipurojn? Kaj ne timas! Per manoj premas! Sorĉisto!

Sinjoro Lupo rezignis grandanime pluan traserĉon de la muŝkaptulo, ĉar pli grava estis nun la traserĉo de lia propra lito, eliris la korton kaj ordonis:

– Borilo! En la vilaĝo estas komercisto Golder, kiu alveturis aĉeti bovidojn. Trovu lin, absolute, kaj per lia ĉarego veturu kun tiu sinjoro al la urbo. Tie transdonu lin al la sinjoro komisaro, komisaro faru kun li, kion volas! Absolute! Por kio mi devas turni al mi la kapon? Sed atentu, ĉar, eble, li estas vera profesoro, do tiam li povas kuiri al ni .kaĉon. Kompreneble?

La veturado al la urbo per la ĉarego kun bovidoj ne estis tiel malagraba, kiel la muŝkaptulo supozis, ĉar li dumvoje sukcesis instrui Borilon, ke la ĉednistra regiono per sia flaŭro kaj faŭno similas al la nigramara kaj la mediteranea: ĉi tie estas la papilio *Saturnia pyri*, estas la floroj *Cypripedium calceolus*, *Pulsatilla pratensis*, *Amygdallus*,



## jubileoj

*dystychia* – restaĵo de antaŭdiluvaj vegetaĵoj, belegaj lacertoj... Kelkion el tio montradis dumvoje la profesoro, aŭ elprenadis el siaj skatoloj.

Oni devas konfesi, ke policano Borilo dum tiu leciono nur unufoje kaj nur por momenteto ekdormis, pro kio rekompence li permesis al la profesoro elveturiĝi kaj kapti belegan adonison, kion li ekdeziris kiel infano.

Ĉe la policejo en la urbo ĉio okazis multe pli glate, ol en la vilaĝo. Tie, antaŭ ĉio, estis policisto el Poznan, el germana lernejo, kaj tiu petis sidiĝi la profesoron, ĝis venos la estro. La estro Kaziomiro Kornfeld, kiu jam sendis peton por ŝanĝo de sia nomo je Kornieviĉ, ĉar lia fianĉino ne volis edziniĝi kun Kornfeldo, montriĝis preskaŭ mondano. Enirinte la kontoron, li silente akceptis de Borilo la Lupan skribaĵon, kaj de la profesoro lian legitimajon. Ne dirinte vorton li altabliĝis, ekfumis cigaredon kaj enprofundiĝis dum kelkaj minutoj super la legitimajon; poste malrapide kaj serioze ekdemandis la profesoron:

– Ĉu vi scipovas legi kaj skribi?

– Mi scias! – respondis ĝoje la profesoro.

Post tiu respondo Kornieviĉ denove profunde enpensiĝis. Lia servo ordonis kredi al neniuj, sed estis okazoj kiam ne kredi estis danĝere – kaj tiam oni devis ĝisfunde prime-diti. Fine leviĝis de la seĝo, ankoraŭ foje ekrigardis la fotografajon en la legitimajon kaj la profesoron kaj demandis:

– Ĉu vi havas en ĉi tiu urbo konatulon kiu atestus vian identecon?

– Eble troviĝos iu – respondis la profesoro. – Kiu studis en la Krakova universitato, tiu povas min koni. Eble estas kuracisto?

Kornieviĉ enrigardis ian kajereton:

– Doktoron Smolynskij vi konas?

– Jes.

Kornieviĉ sendis voki doktoron Smolynskij kaj denove ekpensis,

Kuracisto Somlynskyj<sup>5</sup> estis malfavore enskribita ĉe la polico, li estis ukraino, kiu sidis monaton en aresto, kaj al kiu oni ne sukcesis pruvi la kaŭzon de lia malliberigo, – do li tute ne ekĝojis esti vokita al la policejo. Estas oficejoj al kiuj eĉ anĝeloj irus nevolonte, kaj ni imagu homon kun la krimo esti denaska ukraino.

Feliĉe la vizito ĉe la policejo finiĝis sendanĝere, eĉ gaje. Smolynskij eniris la pordon kaj ekmiris:

– Sinjoro profesoro, kaj ankaŭ vi ĉi tie?!

– Jes! Kaj mi ankaŭ tie, pro studo de podola „faŭno“ kaj „floro“... Mi trovis ĉi tie la posteulojn de la subvavela drako...

La malnovaj konatuloj pro ĝojo eĉ kisis ŝin, kaj sinjoro Kornieviĉ en tiu kiso aprobis la ateston de profesora identeco, donis al li skriban permeson promeni tra ĉiuj valoj kaj kavoj kaj adiaŭe li eĉ prezentis manpremon.

La profesoron invitis la kuracisto al sia hejmo vizite.

**El la ukraina: *Orest Kuzjma***

(Senŝanĝa represo el la gazeto „Literatura mondo“, 1925, №1, pp. 8-10)

<sup>5</sup> Tiel estas en la gazeto.

Iris aphilla, la sama, kiel sur Sicilio, Adonis, akacioj glediĉoj, fama Ephedra dystychia – restaĵo de la antaŭdiluva kreskaĵaro, belegaj lacertoj, zizeloj... Ion el ili la profesoro montris ĉe la vojo aŭ prenis el siaj skatoloj.

Oni devas rekoni, ke la policisto Borilo dum tiu leciono nur unufoje ekdormetis, sed nur por eta momento, anstataŭ tio, kiel premion, li permesis al la profesoro elĉariĝi kaj ŝiri adonidon, kiun li ekdeziris, kiel infano.

En la urba policejo ĉio okazis pli glate, ol en la vilaĝa. Antaŭ ĉio, ĉi tie estis policisto, devenanta el Poznanio, el la germana skolo, li petis la profesoron sidiĝi dum venos la ĉefo. La ĉefo, sinjoro Kornfeld, kiu jam sendis la peton pri ŝanĝo de sia familinomo je Korneviĉ, ĉar lia fianĉino ne volas edziniĝi al Kornfeld, prezentis sin kiel homo preskaŭ monduma. Enirinte la kancelarion, li silente prenis de Borilo la skribaĵon de Lupo, kaj ankaŭ de la profesoro – lian legitimaĵon, ne dirinte eĉ vorton, li sidiĝis ĉe la tablo, ekbruligis cigaredon kaj enpensiĝis pri legitimaĵo dum kelkaj minutoj, poste malrapide kaj respektive demandis la profesoron:

– Ĉu vi scipovas legi kaj skribi?

– Mi scipovas! – ĝoje respondis la profesoro.

Post tiu respondo Korneviĉ denove enpensiĝis profunde. Lia oficokupo ordonis al li fidi neniun, sed estis okazo, kiam ne fidi estis danĝere, – tio postulis detalan konsideron. Fine Korneviĉ ekstaris de sur la seĝo, rigardis ankoraŭfoje la foton en la legitimaĵo, ankaŭ la profesoron kaj demandis:

– Ĉu vi havas iun konaton en la urbo, kiu konfirmus la identecon de via persono?

– Eble iu troviĝos, – respondis la profesoro. – Kiu studis en la Krakova universitato, tiu devas min koni. Eble, estas iu kuracisto?

Korneviĉ trarigardis ian kajeron:

– Ĉu doktoron Smolinskij vi konas?

– Jes.

Korneviĉ sendis por Smolinskij kaj denove enpensiĝis.

Kuracisto Smolinskij ne havis bonan reputacion en la polico – li estis ukraino, ares-tita iam por unu monato kaj al kiu oni ne povis pruvi, pro kio – do, li tute ne ĝojis, kiam lin oni vokis al la policejo. Ekzistas tiaj oficejoj, kien eĉ anĝelo ne irus ĝoje, sed ne nur la homo kun la origina peko, ke li estas ukraino.

Feliĉe la vizitado de la policejo finiĝis ne malagrabla, sed ankaŭ eĉ gaje. Smolinskij eniris la pordon kaj ekmiris:

– Sinjoro profesoro, ankaŭ vi ĉi tie estas?!

– Ha! Ankaŭ mi ĉi tie estas, por studi la podoliajn faŭnon kaj flaŭron... Mi trovis ĉi tie idojn de la ĉevavela drako...

La malnovaj konatoj eĉ interkisis pro ĝojo, kaj sinjoro Korneviĉ ekvidis en tiu kiso la konfirmon de la identeco de la profesora persono, donis al li permeson trairi ĉiujn ravinojn kaj fendejojn kaj eĉ donis adiaŭe la manon.

La kuracisto invitis la profesoron al si gastis.

**EN LA JUĜO**  
**(Ha cyĝi)**

Juna, proksimume 30-jara, gimnazia profesoro Ivan Latka veturis per fervojo al sia nova posteno en S. Li sidis en la triaklasa kupeo kaj enuis. Pro enuo estis rigardanta enon de siaj valizoj sur la bretoj, purigis la ungojn, rigardadis sin en la malgranda poŝspegulo, tordis supren, ĝis la okuloj, lipharojn, ordigis sian laŭmodan kravatton, kiu ŝanĝbrilis kontraŭ la suno kvazaŭ haŭto de lacerto kaj pririgardis siajn flavajn kaprole-dajn ŝuojn kaj bastonon. Kaj kiam tio al li tedis, li estis elmetanta cigaredujon kaj fumis.

Ferioj jam finiĝis; restis ankoraŭ nur du tagoj, la plej karaj por lernantoj, ĉar estis la lastaj. Tial en la stacidomoj kaj en la fervojoj ili estis preskaŭ ne videblaj. Latka veturis pli frue, por trovi al si loĝejon kaj orientiĝi sur la nova posteno.

En la stacio en D. eniris lian kupeon du lernantoj en la uniformaj jakoj kun la signo „G“ sur la ĉapo. Sur la kolumsignoj estis videbla, ke malalta kaj dika lernanto estis el la sesa klaso de la gimnazio, kaj maldika kaj alta, kun la nerazitaj haroj sur la vizaĝo, kiel ĉe junaj judoj, estis el la sepa klaso.

La sesaklasano elmetis sian cigaredujon, donis al la sepaklasano, kaj, ne havante alu-metojn, petis de la nekonata vojaĝanto fajron.

– Ĉu vi, sinjoroj, jam el ferioj? – komencis Latka la konversacion.

– Jes, – respondis la sepaklasano.

– Ĉu estas domaĝe reveni?

– Nu jes ja, certe, ke ne estas agrable.

– Kaj kien vi, sinjoroj, veturas, se mi rajtas demandi?

– Al S.

Latka interesiĝis: ili ja estas la lernantoj de la sama gimnazio, kie li estas oficon-ta. „Eblas pri io sciigi“, – li pensis.

– Kiaj, do, rilatoj estas en via gimnazio? Ĉar foje mi legis en gazeto, ke en ĝi mankas ordo. Lernantoj donis al instruisto vangofrapojn.

– Jes, ĉar li meritis! – respondis kurte la sesaklasano.

– Li estis inerciulo, klerikalulo kaj denuncanto, – klarigis pli detale la sepaklasano.

– Li tre „pipris“, unuvorte – li estis porko.

– Kaj kia estas la direktoro?

– Ĉu direktoro? Maljuna stultulo kaj ĉio! Lia plej granda plezuro estas forpeli iun el la gimnazio. Kaj la lernejkonsilion li timas kvazaŭ unuaklasano. Ĉie elflaras social-demokratojn, radikalulojn, ateistojn, revoluciistojn, kaj mem estas absoluta stultulo.

– Li devas jam emeritiĝi, – kompletigis la sesaklasano la karakterizadon de la direktoro.

La profesoro Latka silentis minuton, sed ne plu povis silenti, ĉar intereso superis lin.

– Ĉu la profesoroj estas bonaj? – denove li demandis.

– Estas diversaj, – respondis la sesaklasano.

– Nun devas veni al nia gimnazio porko, kian la mondo ankoraŭ ne vidis, – aldonis la la sepaklasano.

– Kiu li estas? – demandis kun granda intereso Latka.

– Iu profesoro pri la latina kaj greka lingvoj, li nomiĝas Latka.

Latka ruĝiĝis sur la vizaĝo kaj fiksrigardis la sepaklasanon:

– Kial do porko? Vi ja ankoraŭ ne konas lin? – diris li kiel eble plej trankvile.

– Ni ankoraŭ ne konas, sed ni havas detalajn informojn de lernantoj el la gimnazio, kie li estis ĝis nun.

La profesoro Latka nun pli bone fiksrigardis la dikan sesaklasanon, bonaniman kaj ruĝvangan, pensis, ke de li eblas iom pli multe sciigi, donis al li kaj la sepaklasano siajn cigaredojn kaj parolis plue:

– Lernantoj kalumnias profesorojn, tre ofte senkaŭze, kaj per tio faras maljustaĵojn al ili.

– Nu, al Latka oni certe ne faras maljustaĵojn, – respondis firme la sepaklasano. – Ja li estas instruisto, konata al ni kaj el leteroj, kaj el la studentaj gazetoj! La bestio fieras ankaŭ pri sia beleco, kvankam estas malbela, kiel rato, kaj pri siaj scioj, kvankam estas stultulo, kaj pri siaj kravatoj, – unuvorte, plej moderna pedagogo, kandidato al direktora kaj inspektista posteno, karieristo de la unua klaso, kaj ĉio estas je la konto de la lernantoj.

En la koro de Latka fariĝis malvarme. Li preskaŭ timiĝinta rigardis la junajn kunvojaĝantojn, poste koleriĝis, plue pensis, ke post tiaj vortoj li ne povas konfesi, kiu li estas, kaj, por elembarsiĝi, turnis la vizaĝon al la vagonfenestro kaj forblovis cigaredcindron trans la fenestron.

Povas esti, tiu ŝajniga trankvileco de Latka kuraĝiĝis la sesaklasanon plue paroli.

– Ni ĉion scias! – li diris. – Ĝuste hieraŭ mi ricevis leteron de lia lernanto. Latka estis gvidanto de la sesa klaso.

– Jes! – apenaŭ ne konfirmis la profesoro, sed ekregis sin kaj nur diris: – Nu? Kion do li skribas tie? Estas interese aŭskulti, kiel lernantoj karakterizas profesoron.

– Vere interese, – konsentis kun li la sesaklasano, elpoŝigis la leteron kaj komencis legi:

– „Venos al vi nia Latka. Estas bone, ke oni forprenis lin de ĉi tie, sed bedaŭrinde, ke ne forpelis lin al cent diabloj, sed donis al vi. Rafinita porko, kaj eĉ ne jorkŝira, sed nia, ordinara, galicia, kun longa muzelo kaj krudaj haregoj. Malantaŭ aoristoj kaj kondicionaloj ne vidas la mondon, kvankam mem skribas por si sur paperpecoj ĉiujn klarigojn kaj tradukojn. Li postulas de la lernantoj ĉion parkerigi, kaj mem scias nenion. Donas duojn senfine kaj tiel penas akiri favoron de la lernejkonsilio. Ni estis frakasantaj al li la fenestrajn vitrojn tiel longe, ĝis oni ne forprenis lin de ni. Ankaŭ vi faru tiel, se li ne ŝanĝiĝos.

Pleje li venĝis al ni vintre. Li ĵetis sin svati la filinon de juĝejestro, ĉiutage estis surmetanta novan kravaton, parfumanta sin, kombanta glate harojn, puriganta kaj fajlanta en klasejo siajn ungojn – kaj ricevis pri tio rifuzon, ĉar havas ŝuldojn ĉirkaŭ dek mil!“

„Mensogo!“ – ekkriis io en la animo de la profesoro, sed supren eliĝis nur ia mallaŭta „hm“.

– „Tiam, – legis plue la lernanto, – li furioze venĝis al ni ĝis la Pasko mem, kiam ni frakasis al li ĉiujn fenestrovitrojn. Mi mem, ĵetinte de malproksime per katapulto ŝtone-ton, elbatis tian rondan truon en la vitro kvazaŭ tajlitan. Mi poste iris rigardi“.

## **jubileoj**

La profesoro ege volis vidi skribkarakteron de la leteraŭtoro, sed la sesano sidis tre malproksime de li. Alŝoviĝi pli proksimen por ekvidi ne eblis, ĉar li povus perfidi sin, aŭ, eble, la lernanto povus kaŝi la leteron. Fine, tiu juĝo tiel konsternis lin, ke li ne sciis, kion fari.

Dume la lernanto estis leganta plue – evidente al li estis agrable fanfaroni, kiel li anticipe kolektis informojn pri la nova instruisto.

– „En la kvina klaso oni trovis sufiĉe bonan manieron, kiun ankaŭ vi povas elprovi. Oni ĉiam diris al li, ke plej agrabla leciono estas lia, ke li tre bone instruas kaj ke krom la greka kaj latina lingvoj estas nenio pli bona en la mondo. Tie li malpli furiozis, sed ĉe ni terure! Mi estis metita al reekzamenado...”

La profesoro komencis rememori, kiun li en la sesa klaso metis al la reekzamenado. Li donis malbonan noton pri la greka al ok lernantoj, sekve iu el ili estas la leteraŭtoro. Verŝajne, Plotička – bruto, mallaboremulo, instiganto, – ho! Estas neniu alia, nur li!

Sed ĉi momente la lernanto silentiĝis, kaj la profesoro pretervole ekdiris:

– Ĉu jam fino?

– Ba ne! – respondis la lernanto. – Sed pluaĵo ne estas leginda.

„Kio ankoraŭ povas esti tie?” – pensis la pedagogo, ekstreme interesigita kaj incitita per la letero, kaj artifikis diri:

– Nu, pardonu min, ke mi demandadas, kio estas plue en la letero; ja el via flanko tio jam estas pruvo de granda konfido al mi, nekonato, ke vi tiel multe legis al mi.

Per tiuj vortoj li tuŝis la koron de la sesaklasano, kaj tiu respondis:

– Jam nenio nekutima estas tie. Kamarado skribas, ke lernantoj batis lin pro iu knabino.

– Ĝi estas mensogo! – ekkriis subite Latka, stariĝinte de sur la benko kvazaŭ brogita.

La ambaŭ lernantoj miriĝis kaj ankaŭ ili ekstaris.

– Kaj vi de kie scias? – demandis la sepaklasano per tia voĉo, kvazaŭ volus diri: „Kiel vi darfis nei al ni, ne konante la aferon?!“

– Ĉar ĝuste mi estas profesoro Latka. Mi tanos al vi la haŭton, fiuloj kaj diboĉuloj! – tondre respondis Latka kaj kaptis la bastonon.

En unu momento la lernantoj malaperis el la kupeo kaj fuĝis tra tri vagonoj.

La profesoro Latka ekiris tra sia malvasta kupeo, kvazaŭ leono tra la kaĝo, kaj ri-petadis:

– Fiuloj! Diboĉuloj! Sovaĝuloj! Hajdamakoj!

Poste li sidiĝis kaj peze malĝojiĝis. En la letero estis multe da vero, kaj tio lin affliktis.

1913

*Elukrainigis Volodimir PACJURKO*



**KVB  
(KVD)**

En nia urbeto la plej forta partio estas KVB. Ĝi, oni povas diri, estas internacia, kaj ĝia programo estas tre mallonga kaj klara: k i e n v e n t o b l o v a s, tien klinu vin. El la plej elstaraj ukrainoj apartenas al ĝi: skribisto de starostejo, instruisto de elementa lernejo, juĝeja pedelo kaj estro de la ubra policejo, kiun oni respektite titolas sinjoro inspektoro. Ĝis la aŭtuno 1918<sup>1</sup> ili ĉiuj tenis sin malproksime de la ukrainoj, parolis pole, baptigis siajn infanojn al la latina konfeso kaj manĝis panon, perlaboritan per peza laboro de sia animo.

Subite okazis io neatendita. Kiam la ukrainoj prenis la potencon en siajn manojn, ĉiuj kvar ekparolis ukraine kaj malkaŝe parenციგის kun la ukraina popolo. Krom tio, baldaŭ ĉiu laŭ sia scio skoldis malnovajn civitanojn-ukrainojn kaj nomis ilin mal-honestuloj, ŝtelistoj kaj perfiduloj de Ukrainio. Alia eliro ne estis, necesis alpremi al la koro la novajn sincerajn patriotojn kaj rekompenci ilin pro diligentecon. Al tiu ĉi oni altigis salajron, al tiu donis pli bonan postenon, al aliaj kroman pagan okupon.

La plej bona inter ili sendube estis sinjoro policinspektoro. Li, kompatindulo, nur havis belan titolon, sed kiel la estro super kvar policanoj, estis perlaboranta malmulte. Sekve li turnis sin pri helpo al la prezidanto de la ukraina konsultkonsilio ĉe la komisariato. Kunportis la ateston pri naskiĝo por pruvi, ke li estas denaska ukraino. La prezidanto certigis propraokule, ke havas aferon kun la samlandano de la gr(ek)-kat(olika) rito. Estis vero, ke li malmulte aŭdis pri lia patriotismo, sed ja la malnovaj aŭtoritatoj ne lasis ukrainojn avanci, kaj nun estas malmultaj siaj homoj, necesas helpi la samlandanon kaj restigi lin ĉe la komunumo. La prezidanto de la konsilio klopodis, ke sinjoro inspektoro ricevu bonan lokon en la nutrajkomisiono.

Ankoraŭ ne pasis monato, kiam sinjoro inspektoro jam portis la blazonon de Galicio surbruste kja la blazonon de Ukrainio sur la ĉapo, apartenis al la estraro de la fondiĝinta vilaĝana partio, en la mitingoj parolis: „Kamaradoj! Ni, vilaĝanoj kaj laboristoj“ kaj skoldis popojn kaj bienulojn, sed plej multe la prezidanton de la konsultkonsilio. Al ĉiu estis klare, ke sinjoro inspektoro marŝas takte kun la spirito de la tempo. Krome, li estis perlaboranta ion en liverado de salo, kaj foje estis akirinta ankaŭ iun barelon da nafto kaj vendinta ĝin trans Zbruĉon.<sup>2</sup>

Bona estis la vivo. Bedaŭrinde, ĝi daŭris mallonge. Revenis poloj kaj arestis lin. Sed, kiel bonaj homoj, ili ne internigis lin en koncentrejon, nur tenis lin proksimume semajnon en kazerno sub arma observo kaj ellasis. Dum tiu tempo sinjoro inspektoro sukcesis montri al la prezidanto de pola kuratora konsilio alian ateston pri naskiĝo, pruvantan, ke li estas latinrita kaj polo. La atesto pri naskiĝo estis malnova, antaŭmilita, kaj el ĝi ĉiu justa homo povis ekkoni fortan karakteron de sinjoro inspektoro: ne nun, pro timo antaŭ puno, sed ankoraŭ antaŭ la milito, en paca tempo, li akceptis la latinan riton kaj poliĝis – sekve la homo havis proprajn konvinkojn. Por pruvi tion li prezentis pri ukrainoj kelkajn tre valorajn informojn, surbaze de kiuj la prezidanton

<sup>1</sup> La 1-an de novembro 1918 estis proklamita la Okcidentukraina Popola Respubliko.

<sup>2</sup> Laŭ la rivero Zbruĉo pasis la limo inter Polujo kaj Sovetio.

## jubileoj

de la eksa konsultkonsilio kaj ankoraŭ kelkajn ukrainojn oni deportis al sekuraj lokoj occidenten de Sjano.

Sinjoro inspektoro kudrigis al si novan veston kaj rondan ĉapon kun pola aglo kaj multe kompletis al sinjoroj bienuloj, kiuj dum la unuaj semajnoj tenis la disrktkoster- nilon en siaj manoj. El la partio de k o v o b o j li ne ekŝiĝis – li estas ĝia plej fidela membro, kvankam kun du atestoj pri naskiĝo, sed kun unu animo...

[1919-1920]

*Esperantigis Volodimir PACJURKO*

# 125 JAROJ EKDE LA NASKIĜTAGO DE MIĤAJLO HAJVORONSKIJ

Nun tre malmultaj homoj en Ukrainio konas lian nomon. En Galicio ankoraŭ kantas iliajn kantojn, sed la homoj, precipe junaj, scias pri la aŭtoro preskaŭ nenion. La komunisma reĝimo en Ukrainio faris ĉion eblan kaj neeblan, por konvinki la homojn, ke ilia adreso estas nek domo, nek strato, sed Sovetio. Tiudirekte ĝi multe sukcesis. Multaj ukrainoj abdikis sian lingvon, historion, kulturon, kaj tiujn, kiuj restis fidelaj al sia popolo, ne malofte nomas naziistoj kaj faŝistoj. La nomoj de multegaj ukrainaj kulturagantoj nenion al ili diras. Sed la historio memoras grandajn gefilojn de Ukrainio.

Miĥajlo Hajvoronskij famiĝis per siaj siĉpafistaj kantoj. Por la legantoj de „Ukraina stelo“ ni mallonge memorigos, ke siĉpafistoj estis volontula militista formaĵo enkadre de la aŭstria armeo. Ĝiaj anoj estis iamaj membroj de la diversaj militistaj societoj, fonditaj antaŭ la unua mondmilito en Galicio; „Ukrainaj siĉpafistoj“, „Siĉo“ (origine: kozaka armeo), „Sokil“ („Falko“), „Plast“ („Skaŭtoj“). La vicoj de la ukrainaj siĉpafistoj (USP) konsistis precipe el junaj, kleraj patriotoj. La aŭstria komandantaro ĉiam sendis la USP-anojn por plej malfacilaj taskoj. En la jaroj 1915-1917 la USP-anoj montris sian heroismon en la bataloj kontraŭ rusaj trupoj sur la monto Makivka en Karpatoj, sub Haliĉo, Bereĵano kaj apud Kozovo. La kreo de USP estis la unua provo krei ukrainan nacian armeon, kiu povus defendi la interesojn de la ukrainoj kaj liberigi ilin de fremdlanda regado. USP kiel armeo bezonis siajn marŝojn, kantojn, orkestrojn. Ĉion ĉi akumulis en sia talento Miĥajlo Oresto Hajvoronskij.



La estonta komponisto naskiĝis la 15-an de septembro 1892 en Zaliŝĉiko. Jam ok jarojn aĝa li lernis vionludon kaj muzikan teorion. Finis la lokan instruistan seminarion. Laboris kiel instruisto en vilaĝo apud Lvivo, studis en la Supera Muzika Instituto „Mikola Lisenko“. Estante seminariano gvidis seminariajn gean kaj viran ĥorojn kaj orkestron. Liaj unuaj komponistaj provoj apartenas al la jaro 1910. Dum la granda koncerto en Lvivo, dediĉita al la 100-jariĝo de Taras Ŝevĉenko, gvidis instruistan ĥoron, kiu plenumis ankaŭ la unuajn muzikajn verkojn de Hajvoronskij je la vortoj de Oleksandr Oles<sup>1</sup>.

Post eksplodo de la unua mondmilito en Galicio komenciĝas granda naciliberiga movado. Hajvoronskij aliĝas al la Legio de ukrainaj siĉpafistoj, partoprenas batalojn en Karpatoj, estas promociita al la suboficiro. Organizas kaj gvidas la blovorkestron de USP, komponas marŝojn kaj kantojn. Ekde la jaro 1918 inspektas la militorkestrojn de la Ukraina Galicia armeo, gvidas la orkestrojn de la Ukraina teatro en Kamjanec-Podilskij kaj en la Sadovskij-teatro en Kijivo, instruas en la Supera Muzika Instituto kaj knabina gimnazio.

En la jaro 1923 elmigras al Usono. Kune kun Roman Pridatkeviĉ fondis en la jaro 1924 muzikan konservatorion en Novjorko, organizis Ukrainan instrumentan orkestron, kiun gvidis ĝis la 1936, unuigitan ĥoron el ĥoranoj de ĉirkaŭaj preĝejoj, kun kiu aranĝis grandajn koncertojn de siaj verkoj en la jaroj 1932-1936. En la jaro 1936 grave malsaniĝis. Mortis en la jaro 1949 en Novjorko, kie estis enterigita.

La komponisto kreis pli ol 30 siĉpafistajn kantojn, el kiuj ĝis nun popularas „Iris pafisto militon“ («Іхав стрілець на війноньку»), „Еј, sur la monto marŝas Siĉ“ («Гей, там на горі Січ іде») kaj aliaj. Kortuŝe sonas lia rekviemo „Kiam vi estis mortantaj, sonoriloj al vi ne ludis“ («Як ви умирали, вам дзвони не грали»), plenumata dum diversaj solenaĵoj. Hajvoronskij komponis muzikon por diversaj teatraĵoj kaj muzikon por 2 liturgioj.

Plej bonaj verkoj de Hajvoronskij eniris la oran fonduson de la ukraina muziko.

*Laŭ materialoj de „Vikipedio“ Miron ZASTAVNIJ*

**Lazaro Ludoviko ZAMENHOF**

## **LA VOJO**

Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni la direkton ĝi diras.  
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,  
Nek batoj de l'sorto, nek mokoj de l' homoj,  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas, la voj' elektita.

## **ШЛЯХ**

Мета – наче вогник в тумані густому,  
Що здалеку світить звабливо,  
Вона, наче зірка у небі нічному,  
Що вказує шлях нам правдивий.  
Тому й не страшні нам північні примари,  
Зла доля, знуцання і буряні хмари, –  
Ми, шлях свій обравши, по ньому ходю  
Йдемо у майбутнє прямою.

<sup>1</sup> Oleksandr Oles (ukr. Олесь, 1878-1944) – ukraina verkisto.

## esperanto – malesperante

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino, kal la *pacienco* –  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante.  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –  
Ni semas kaj semas konstante.  
„Ho, ĉesu!“ mokante la homoj admonas, –  
„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ en kor' al ni sonas:  
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi pacience eltenos“.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj  
Velkantajn foliojn deŝiras,  
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,  
Ni forton pli freŝan akiras.  
Ne mortos jam nia bravega anaro,  
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,  
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,  
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

Йдемо уперед ми уперто й сміливо,  
Обравши зорю заповітну,  
Бо знаєм, що й краплі дарують нам диво –  
Продовбують брилу гранітну.  
Надія, упертість велика й терпіння  
Наснагу дають для ходи й устремління  
У праці постійній для доброї справи –  
Мети досягнути і слави.

Ми сієм зерно, засіваємо поле,  
Про жниво в прийдешньому мрієм, –  
Хай сотні, хай тисячі зернят ніколи  
Не зійдуть, – ми сіємо, сієм!  
„Вгамуйтеся, безумці!“ – юрба вимагає,  
„Не слухайте, сійте!“ – у душах лунає, –  
За працю важку і натомлені руки  
Вам скажуть спасибі онуки“.

Коли ж у посуху чи в бурю раптову  
З віт листя зів'яле спадає,  
Нас, вітрові вдячних й очищених, знову  
Новою снагою проймає.  
Не вмере наша сміла, завзята громада, –  
Її не зупинить найбільша завада,  
Вона своїм шляхом і в чорну годину  
Іде до мети без упину.

Йдемо уперед ми уперто й сміливо,  
Обравши зорю заповітну,  
Бо знаєм, що й краплі дарують нам диво –  
Продовбують брилу гранітну.  
Надія, упертість велика й терпіння  
Наснагу дають для ходи й устремління  
У праці постійній для доброї справи –  
Мети досягнути і слави.

*Переклав Петро ТИМОЧКО  
Tradukis Petro ТИМОЇКО*



Petro TIMOČKO (1925-2005) – mininĝeniero. Post la Dua mondmilito estis ekzilita al Apudmoskvio kaj Transbajkalia. En Ukrainion revenis en 1a jaro 1956. Poeto, tradukisto, publicisto. Aŭtoris 8 poemarojn. Lerninte ankoraŭ dum gimnazia periodo latinon, la germanan kaj polan lingvojn, li daŭrigis altigi sian posed-nivelon de ili. Tradukis el la germana, pola, rusa, ĉeĥa lingvoj kaj el Esperanto. La libro de la tradukitaj de li poeziaĵoj de J. W. von Goethe „Neestingebla amo“ nombras preskaŭ 500 paĝojn! Ukrainigis poeziaĵojn de L. Zamenhof, E. Privat, V. Eroŝenko, E. Miĥalski, J. Baghy, W. Auld, E. Seemannova. Membro de la Unuiĝo de ukrainiaj verkistoj, laŭreato de kelkaj literaturaj premioj.

*Viktor JASKOVEC, Ivano-Frankivsk*

## ANKORAŬ KELKVORTE PRI LA FILOKARTIO

En “Ukraina Stelo” n-ro 4, 2016 estas prezentita artikolo de Vasil Antonjuk (plue – V.A.) pri E-filokartio de “Ukraina Stelo”. Tie la aŭtoro priskribas 11 poŝtkartojn dividitajn je 3 periodoj. Ĉar la plimulton da informo jam li donis, al mi restas nur aldoni kaj ĝustigi tiuspecan informon.

Laŭ la prezentita klasifiko, por la dua periodo (la milita, 1915-1916) estas priskribitaj 5 poŝtkartoj. Sed Ivan Ĉepiha en la bibliografio, eldonita en 1916 en Vieno, mencias: “Eldono de “Ukraina Stelo” en Kolomea 1915, en Vieno 1916, 6 переписних листків”, t. e. 6 poŝtkartojn. Tio signifas, ke devus esti ankoraŭ unu poŝtkarto. Sed komence mi klarigu, kial estas skribite “en Kolomea 1915, en Vieno 1916”, ja oni scias, ke Oresto Kuzma (la fakta posedanto de la ‘komerca marko’ “Ukraina Stelo”) dum ĉi ambaŭ jaroj loĝis en Vieno, sed ne en Kolomeo. Laŭ mia opinio, en 1915 Oresto Kuzma en Vieno eldonadis la poŝtkartojn kiel eldonojn de esperanta gazeto “Ukraina Stelo” en Kolomeo, kaj pro tio li skribis “en Kolomea” (‘Kolomea’ estas aŭstria formo de ‘Kolomeo’). Ekde 1916 Oresto Kuzma registris redakcion kun la sama nomo “Ukraina Stelo” laŭ la adreso: Wien, VII. Mechitharistengasse Nr. 9, I. Stock, Tür 8. Pro tio li ekrajtis kaj komencis aperigadi diversajn eldonojn indikitajn “en Vieno.

Do, ĉu ni povus difini, kia la sesa poŝtkarto estas eldonita en Vieno? Jes. En “Ukraina Stelo” n-ro 1, 1922, estas skribite: “En la jaro 1916 aperis en Vieno jenaj eldonaĵoj de Ukraina Stelo. a) Віденський календар укр. воєнних емігрантів на рік 1916. Накладом редакції “Зорі України” – elĉerpita. b) Bildpoŝtkartoj: 1) Mapo de Ukrainujo. 2) Pasaj batalantoj. 3) Ukraina Legiono. 4) Estraro de la Ligo por Liberigo de Ukrainujo. 5) El la vivo de ukrainaj elmigrintoj en Vieno”. En ĉi tiu listo ni vidas, krom jam konatajn poŝtkartojn, ankaŭ la unu nekonatan – “Ukraina Legiono” (pli ĝuste – “Ukraina Legio”,

## historio de la E-movado en Ukrainio

aŭ “Legio de Ukrainaj Siĉ-Pafistoj”). Kiel aspektis tiu poŝtkarto, mi dume ne scias. Sed mi povas supozi, ke same, kiel unu el kvar fotoj far Oresto Kuzma, kiuj estis prezentitaj en la milita ekspozicio en Vieno en 1916-1917. Sur tiu foto estis bildo de viena urbodomo, apud kiu la dua viena kompanio de Ukraina Legio



defilas antaŭ membroj de “Generala Ukraina Konsilio”, “Ukraina Batal-Administracio” kaj militestroj. La foto estis farita 26.04.2016.

Kelkvorte pri la esperantlingvaj mapoj de Ukrainio (laŭ V. A. – n-roj 3 kaj 6). Ĉi ambaŭ poŝtkartoj troviĝas en Aŭstria Nacia Biblioteko sub inventaraj numeroj Pk 385 kaj Pk 386. La unua estas datita “ĉirkaŭ 1918” (V.A. -1913), la dua – 1918 (V.A. -1916). Tia datado montras, ke la unua poŝtkarta mapo ne havas enskribitan jaron de la eldono. Samtempe, se tio ne estas eraro de la arkivo, la dato de la dua poŝtkarta mapo montras unu el du eblecojn: a) aŭ en 1916 okazis reeldono de la poŝtkarto n-ro 3, kaj la poŝtkarto n-ro 6 unufoje aperis en 1918; b) aŭ la poŝtkarto n-ro 6 estis eldonita minimume dufoje – en 1916 kaj 1918. Ĉiuokaze el tio oni



povas fari du konkludojn: 1. la poŝtkartoj povis esti kelkfo-

je reeldonitaj, tial ankaŭ la poŝtkartojn n-roj 1 kaj 5 oni povis reeldoni en 1922, kaj indiko de ĉi tiu jaro ne estas miso, kiel asertas V.A.; 2. la tria postmilita periodo ampleksas ne nur la jaron 1919, sed ankaŭ 1918. Por aserti ion kun certeco, oni devas en ĉiu aparta okazo vidi kontraŭflankon de ĈIU poŝtkarto.

Samtie, en Aŭstria Nacia Biblioteko, troviĝas ankoraŭ unu poŝtkarto eldonita en 1918. Tio estas portreto de L. Zamenhof farita en Dreseno en 1908 dum la 4-a UK. La portreto estas subskribita en tri linioj: D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof || \* 15. XII. 1859 † 14. IV. 1917 || Aŭtoro de Esperanto. La germanlingva priskribo sciigas, ke kontraŭflanke troviĝas skribaĵoj Esperante kaj ukraine. Ankoraŭ 14.12.2015 en Fejsbuko mi donis ligilon al tiu poŝtkarto kaj skribis: “Tiu bildkarto, eldonita en



D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof  
\* 15. XII. 1859 † 14. IV. 1917  
Aŭtoro de Esperanto

la jaro 1918-a, konserviĝas en la Aŭstria Nacia Biblioteko. Dorsflanke lokiĝas skribaĵoj esperante kaj ukraine. Bedaŭrinde mi ne vidis tiujn skribaĵojn, sed mi estas certa, ke tiun ĉi bildkarton aperigis eldonejo “Ukraina Stelo””. Ankaŭ nun mi estas certa, ke ĉi tio estas eldonaĵo de “Ukraina Stelo”, sed pruvo aŭ kontesto de tio aperos tiam, kiam aperos bildo de la kontraŭflanko.

Fine mi volas atentigi vin pri ankoraŭ unu poŝtkarto el Aŭstria Nacia Biblioteko, datita “ĉirkaŭ 1913”. Ĝi montras ukrainan esperantiston Anatolo Koĥ en popola vestaĵo kun verda steleto. Kvankam la indikita jaro koincidas kun jaro kiam “Ukraina Stelo” komencis eldonadi la unuajn poŝtkartojn, sed ĉi poŝtkarto plej verŝajne estas iu pola eldonaĵo. Sed ĝi estas interesa per sia subskribo en du linioj: Anatolo Koĥ || Ukrainano. Oni scias, ke en “Ukraina Stelo” n-ro 1, 1913, aperis enketo pri tio, kiel esperantigi vortojn ‘Україна’, ‘українець’ ktp. Samtempe estis esprimita opinio, ke Ukrainujo = lando, ukraino = homo, ukraina = adjektivo. Resumo (nomita ‘solvo’) de tiu enketo estis publikigita en “Ukraina Stelo” n-ro 3-4, 1913. Ĝi konfirmis la proponitan tradukon kaj ties derivaĵojn. La resumo finiĝis per la vortoj: “Esperantaj gazetoj estas petataj represi”. Fakte de tiu tempo kaj ĝis nun la ukrainoj uzadas tian esperantigon. Nun ĝi estas rekomendita de la Akademio de Esperanto, ĝin enhavas la Nova PIV. Sed tiam, en “Ukraina Stelo” n-ro 5, 1913, aperis artikolo, titolita “Ankoraŭ pri “Nia Enketo”, en kiu oni skribis: “... jam post dissendo de Marto-Aprila N-ro ni ricevis p. k. de S-ro A. Koĥ el Varsovio, kiu sola volas resti kun sia persona opinio pri vorto (nomo) Ukraino?! (Ni ricevis nenian opinion de li. Red.) kiel nomo de lando kaj cetera. Ĉu li opinias ne esti “Ukraino”? Al ni ŝajnas ke dum Krakova Kongreso li prezentadis sin kiel Ukraino?..”. Evidentas, ke tiu sola opinio de Anatolo Koĥ, koincidas kun la subskribo sur la menciita poŝtkarto, kaj malkoincidas kun la opinio de ĉiuj aliaj ukrainoj.

La esplorado daŭras.



Anatolo Koĥ  
Ukrainano.

# Legu en la sekvaj numeroj de nia gazeto:

- ◆ kelkaj pensoj pri nialanda esperanto-movado;
- ◆ “Antologio de la ukraina literaturo”: stato, problemoj, perspektivo;
- ◆ novaj metodoj en esperanto-instruado.

Transsendu nian gazeton  
al viaj konatoj kaj geamikoj enlande kaj eksterlande!

## Mendu librojn kaj gazetojn







diversaj numeroj de “Ukraina stelo”

materioj de la scienc-praktikaj konferencoj



diversaj numeroj de “Helianto”

la libroj tradukitaj el Esperanto



diversaj eldonaĵoj tradukitaj el la ukraina, originale verkitaĵ libroj, vortaroj, lernolibroj, proverbaroj

ĉe Niko Vološin laŭ la retadreso: [niko\\_helianto@yahoo.com](mailto:niko_helianto@yahoo.com)

aŭ la poŝta adreso: Libroservo de UkrEA, p.k. 26, Lucko-18, UA-43018, Ukrainio